

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

v-19034

1999

POPOLA KUNIO

中國報

1

1999

ISSN 0032 - 4361



Novjara mesaĝo
Anekdotoj pri leporo
Loĝkutimoj de ĉinoj
Vojaĝo en Tibeto



Azadi-placo en Teherano

de NASER ASGAR ZADEGAN (Irano)

Nova jaro alportos al ni novan esperon. Ni deziras al ĉiuj niaj legantoj feliĉon kaj sukceson en la nova jaro. Ni, redaktoroj, havas la devon plibonigi la revuon kaj doni al la legantoj pli da interesaj tekstoj. Al la ĉinoj plaĉas la jaro 1999, ĉar laŭ la ĉina luna kalendaro, je la 16-a de februaro 1999 komenciĝos la Jaro de Leporo, kiu aŭguras feliĉon kaj pacon. Kia besto estas la leporo por la ĉinoj? Kian signifon havas la Jaro de Leporo? La artikolo "Anekdotoj pri leporo" donos respondon. Niaj legantoj informiĝos ankaŭ pri tio, kian rolon ludas la tradicia kulturo en la pensoj, agoj kaj vivo de modernaj ĉinoj.

En Ĉinio, ĉie videblas influo de tradicia kulturo, ekz. en loĝkutimoj. Responde al s-ano Kalju Lillepuu ni aperigas la artikolon "Loĝkutimoj de ĉinoj". Ĉar en la vastega Ĉinio estas multaj etnoj, kies loĝkutimoj estas tre diferencaj. La artikolo ne povas kovri tiel vastan temon. Aldonoj sekvos estonte.

Iuj legantoj skribis pri la efiko de kuracmetodoj el la rubriko "Por via sano". Ni tre ĝojas daŭrigi tiun rubrikon en 1999. Ĉar iuj ĉinaj medikamentoj estas malfacile akireblaj por alilandanoj, ni pli multe koniĝos al ili kuracmetodojn ol medikamentojn.

La "Jarmila Cimo" pritraktata en la artikolo "La problemo de 'Jaro 2000'" nun embarasas la homaron. Tamen la historio diras, ke neniu problemo povas bari la progreson de la homaro. Ni kun ĝojo bonvenigu la venontan jarcenton!

La Red.

El Popola Ĉinio

1 [484] 1999



Flora bazono

Foto de Liu Sigong

En sudokcidenta Pekino estas flora bazono kun areo de pli ol dekmil kvadrataj metroj. En la bazono estas 300 budoj kun pli ol 3 000 specioj da floroj. Ĉiutage la bazaron vizitas multaj urbanoj ne nur por aĉeti florojn, sed ankaŭ por ĝui la miniaturajn envazajn pejzaĝojn.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakto de "El Popola Ĉinio"


Direktoro: Wang Xifu
Adreso: P.O. Kesto 77,
Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso:
+86-10-6832 1808

Retpoŝto:
epc@china-report.com

Hejmpaĝo:
<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

ENHAVO

- | | | |
|----|--|---|
| 2 | INTER NI | Produktejo de ginsengo |
| 4 | Novjara mesaĝo | 28 AMUZO |
| 5 | La problemo de "Jaro 2000" | 29 EKONOMIE: |
| 6 | ĈINA KULTURO:
Anekdotoj pri leporo | Pudong — bona loko por investantoj |
| 8 | JUNULARO:
"Plenkreska filino ne devas resti hejme"
Ĉina junularo statistike | 35 Vojaĝo en Tibeto |
| 10 | De lernanto al praktikanto de Esperanto | 38 ORDINARAJ ĈINOJ:
Familio sur stepo |
| 12 | ORIGINALE VERKITAĬJ:
Apud la rivero, hazarde (Mikro-novelo) | 40 Maŭzoleo de Yue-reĝo |
| 13 | POR KOMENCANTOJ:
Sankta Valteno kaj ĉokolado | 42 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:
Loĝkutimoj de ĉinoj |
| 13 | Memore al Charles Ghiselin | 44 Familio de orfoj |
| 14 | SUR NIA LIBROBRETO:
Helpanto por koni Japanion | 46 EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 15 | ESP-NOVAĬOJ | 47 La sonĝo de Tomka |
| 16 | "Ĉina princino" revenis | 48 Tabloteniso en Ĉinio |
| 20 | Prilep — urbo de Esperanto | 49 KORESPONDI DEZIRAS |
| 21 | VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ:
Vestoj de mjaŭ-oj | 50 POR VIA SANO:
Ĉin-medicina memkuraco |
| 25 | EN ĈINAJ URBETOJ: | 51 ĈINAJ POŝTMARKOJ:
Skulptaĝo el Shoushan-ŝtono |
| | | 2 FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:
Azadi-placo en Teherano |
| | | SUR LA DORSKOVRILO:
Neĝo en antaŭurbo de Pekino |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|---------------------|-------------------|
| 1. Shaoxing (p. 40) | 4. Ji'an (p. 25) |
| 2. Yunnan (p. 42) | 5. Pudong (p. 29) |
| 3. Lanzhou (p. 47) | 6. Tibeto (p. 35) |



Novjara mesaĝo

Ĉ E la sojlo de la Nova Jaro mi kore deziras al niaj legantoj, perantoj kaj iliaj familianoj feliĉon kaj prosperon, nome de ĉiuj laborantoj de la redakcio de “El Popola Ĉinio”!

En la ĵus pasinta jaro ni faris klopodojn por plibonigi nian revuon, kaj laŭ la leteroj de legantoj, nia revuo estas pli plaĉa enhave kaj forme. Menciindas ankaŭ, ke nia revuo legeblas ankaŭ en Interreto ekde la marta numero kaj nia esperantista teamo estis plifortigita per junaj homfortoj. Ne malpli grave, la nombro de abonantoj ne malkreskas kaj nia financo estas stabila. Kvankam niaj atingoj ne estas brilaj, tamen ili nutras iom da kuraĝo por daŭrigi niajn klopodojn.

En la nova jaro la rubrikoj restas senŝanĝaj. Laŭ la enketo, la rubrikoj “Ĉinaj E-istoj”, “Originale Verkitaj”, “Esp-novaĵoj”, “Por Komencantoj”, “Temo Proponita de Legantoj”, “Ĉina Kulturo”, “Junularo”, “Multnacia Ĉinio”, “Por Via Sano” kaj “Inter Ni” estas la plej bonvenaj. Daŭre klopodante fari tiujn ĉi rubrikojn pli interesaj kaj allogaj, ni strebas plibonigi la ceterajn.

Ni sentas grandan ĝojon, ke dum la pasintaj 3 jaroj la rubriko “Laŭ la Silka Vojo”, kiu finiĝis aŭguste 1998, trovis varman bonvenon kaj estis multe laŭdata. Por rekompenci la amon de niaj legantoj al nia revuo, ni malfermis novan rubrikon “Vestoj de Ĉinaj Nacioj” ekde la septembra numero 1998, kun

la espero, ke ankaŭ tiu ĉi rubriko plaĉos al vi. Ni nun preparas nin por lanĉi alian rubrikon tiel altiran kiel “Laŭ la Silka Vojo” kaj prezentos al vi kiel eble plej baldaŭ.

En oktobro 1999 la ĉina popolo jubileos la 50-jariĝon de la Ĉina Popola Respubliko, kaj ni konigos grandajn ŝanĝojn, kiuj okazis al la vivo de la ĉina popolo, al la ekonomio, kulturo, scienco, tekniko, edukado, sanprotektado kaj aliaj aferoj de Ĉinio dum la pasintaj 50 jaroj, precipe dum la lastaj 20 jaroj. Decembre okazos alia grava evento, t.e. Aomen (Makao) revenos al Ĉinio, kaj ni donos al vi bazajn informojn pri ĝi kaj raportos pri la revena solenaĵo.

Ekde la pasinta septembro ni havas retpoŝton kaj nun konstruas nian propran hejmpaĝon <<http://www.china-report.com>> kun informoj ankaŭ pri Ĉina Esperanto-Ligo kaj Ĉina Esperanto-Eldonejo, kiu espereble baldaŭ estos malfermita.

Kompreneble, la plibonigo de la revuo bezonas la kreskon de abonoj, kaj la kresko de abonoj dependas de klopodoj ne nur de ni, sed ankaŭ de niaj legantoj kaj perantoj. Se ĉiu tria aŭ kvara el niaj legantoj sukcesos varbi unu novan abonanton, ni multe progresos. Mi sincere esperas, ke jarfine ni havos konsiderindan kreskon de abonoj, por festi la 50-jaran jubileon de nia revuo en majo de la jaro 2000!

Kun bondeziroj por la jarŝanĝaj festotagoj, kore salutas via

Dai Song'en
Vicĉefredaktoro
de “El Popola Ĉinio”

LA nova jarmilo proksimiĝas al la homaro. Tamen en la lasta jaro de ĉi jarmilo oni devas ĉiamaniere forpuŝi la “Jarmilan Cimon” — la problemon de “Jaro 2000” en komputiloj.

Nun multaj konscias, ke antaŭ la jarmila ŝanĝiĝo la entreprenoj kaj institucioj nepre devas solvi la problemon, alie lamos iliaj komputilaj sistemoj. La tempo urĝas nin.

La problemo de “Jaro 2000” venis de la softvara projekto pri jaroj. En la frua tempo la komputiloj ne estis potencaj en konserva kaj kalkula funkcioj, kaj por ŝpari spacon, oni indikas jarojn per la lastaj du ciferoj, ekz. 00 por la jaro 1900, tamen 00 ankaŭ por la jaro 2000, do la komputiloj ne kapablas diferencigitiujn du jarojn. Kvankam rapide progresas la hardvaroj, tamen la “Jarmila Cimo” sin kaŝas en la softvaroj de diversaj komputiloj. Ĝi estas problemo ne nur teknika, sed ankaŭ administra.

En landoj avangardaj en informaj teknikoj, komputiloj estas vaste aplikataj, tial ili pli grave suferas de la jarmila problemo. Fakuloj diris, ke en tiaj landoj la ekonomia progreso malrapidos en la jaro 1999. Iuj eĉ timas, ke la problemo kaŭzos ekonomian dekadencan.

Iuj landoj starigis komisionon por esplori kaj akceli la solvon de la jarmila problemo. La komisiono diskonigas la problemon, vekas la atenton de diversaj entreprenoj kaj en la teknika kampo helpas la entreprenojn, ŝtatajn in-

stituciojn kaj aliajn landojn.

Laŭ propono de la komisiono, ĉiu institucio devas havi du planojn: unu por solvi la problemon, kiam ĝia propra komputila sistemo ne funkcios, kaj ĝi devas garantii, ke la centra sistemo bone funkcios; kaj la alia por solvi la problemon, kiam aliaj sistemoj ne funkcios.

Tamen laŭ la plej optimisma opinio, en tiuj landoj, kiuj jam sin preparis por solvi la problemon, 85% de la softvaroj ankoraŭ bezonas korekton aŭ anstataŭigon.


En Ĉinio aplikado de komputiloj komenciĝis malfrue kaj estas nemultaj ŝtatnivelaĵaj komputilaj sistemoj de aplikaj retoj kaj datenobankoj. Ĉinio ne tiel multe dependas de komputiloj kiel la evoluintaj landoj, tial la jarmila problemo ne tiel multe influos ĝian socian vivon. Sed en Ĉinio estas uzataj 10 milionoj da komputiloj kaj grandnombraj Centraj Procezo-Unuoj (CPU), la esplorado kaj korektado pri ili bezonas longan tempon kaj grandan laboron.

La 26-an de aŭgusto de 1998, rilate al la jarmila problemo kunveno estis kunvokita de la Ministerio de Informa Teknika kaj Telekomunika Industrio de Ĉinio. La kunveno anoncis, ke antaŭ la 31-a de marto de 1999 oni finos korekton de komputilaj sistemoj en Ĉinio kaj antaŭ la 30-a de septembro oni finos es-

ploron kaj provuzadon de la korektitaj sistemoj. Privilegion ĝuos la gravaj institucioj, kiaj tiuj pri telekomuniko kaj poŝto, elektro, akvoliverado, trafiko, energio, mon-cirkulado, valorpapero, financo kaj imposto.

Tamen la solvado en Ĉinio ne estas tre facila — la abundeco de komputilaj softvaroj kaj hardvaroj malfaciligas la korektadon; mankas al multaj ĉinaj entreprenoj kaj institucioj specialistoj, kiuj lertas en projektado kaj administrado de komputilaj programoj; multaj fakoj ne havas kopion de la sistemo, tial oni ne povas haltigi la sistemon por la transformado; laboro abundas, tamen tempo mankas. Krome, estas ankaŭ multaj aliaj baroj.

“Jarmila Cimo” estas komuna problemo de la homaro. Ĝi defias nian saĝon kaj memfidon. Ŝajne ni estas teknike fortaj por solvi la problemon, tamen ni ne kuraĝas diri, ke ni povos solvi ĉiujn problemojn tiurilatajn. Ĉu unu jaron poste ni povos trankvile sidi antaŭ nia komputilo? Tion ni deziras. ■



La problemo de “Jaro 2000”

Anekdotoj pri leporo

- La leporo, milda kaj aminda, havas sian lokon en ĉinaj mitoj.
- La Blanka Leporo estas rigardata de ĉinoj kiel dio de generado. Leporo estas simbolo de la luno. La adorado al la luno estas fakte adorado al naskado.
- Leporo estas ne nur bonaŭguraĵo en ĉina teatro, sed ankaŭ bonvenigata rolo en rakontoj kaj karikaturnaj filmoj de aliaj landoj.

de YANG ZHEN

LA Jaro de Tigro finiĝos je la 15-a de februaro 1999 (la 30-a de la dekdua monato laŭ la ĉina luna kalendaro). En tiu ĉi jaro tre aktivis la atmosfera fenomeno El Nino. En Ĉinio okazis inundego nevidita en la pasintaj cent jaroj. Venos la Jaro de Leporo laŭ la ĉina luna kalendaro. Kun leporo kiel bonaŭguraĵo, la fenomeno El Nino espereble mildiĝos kaj la orientaj landoj kaj regionoj, kiuj kronologie difinas la jarojn per dek du bestoj, havos jaron de paco kaj feliĉo.

LA BLANKA LEPORO EN LA LUNO

La dek du bestoj de Hindio, kiuj simbolas naskiĝjaron, estas rajdbestoj de dek du dioj. Leporo servas por unu el la dioj kaj viciĝas tuj post leono, rajdbesto de alia dio. La naskiĝjar-simbolaj bestoj de Hindio estas preskaŭ samaj kiel tiuj de Ĉinio. Nur tigran anstataŭas leono kaj kokon — fringelo. Laŭdire, Vjetnamio prenas la naskiĝjar-simbolajn bestojn de Ĉinio kiel la siajn, tamen vjetnamoj anstataŭigis leporon per kato. Pro tio la lando havos jaron de kato en 1999.

La leporo, milda kaj aminda, kvankam malfacile diigebla, havas

sian lokon en ĉinaj mitoj. Sur la steloplana ĉielo plej okulfrapas la luno. Ĝi kaj la suno aperas alterne en la ĉielo. Leviĝo kaj subiro de la suno kaj la fazoj de la luno akcelis la disvolviĝon de la antikvaj agrokulturo, astronomio kaj kalendaro. La sunaj makuloj kaj luna ombro multe pensigis antikvajn ĉinojn. Laŭ ili, la suno estas ora korvo kun tri piedoj kaj en la luno vivas blanka leporo, kiu ĉiam preparas panaceon. Sekve de tio, la ĉinoj rigardas la oran korvon kiel transformiĝinton de la suno kaj la leporon kiel tiun de la luno. Pro tio la luno portas ankaŭ la nomojn Blanka Leporo, Lepora Luno kaj Lepora Lumo. Estas interese, ke ankaŭ antikvaj grekoj opiniis, ke la suno estas ora korvo, tamen ili rigardis katon kiel transformiĝinton de la luno. El tio oni povas diri, ke la analogeco de pensmaniero okazis en la kultura disvolviĝo de diversaj nacioj en la antikveco.

Laŭ antikvaj ĉinoj en la luno, krom la Blanka Leporo, vivas ankaŭ belulino Chang'e kaj Wugang, kiu hakas senĉese cinamarbon. Ĉina mito diras, ke ŝtele englutinte la panaceon donitan de diino Xiwangmu al ŝia edzo, Chang'e flugis al la Luna Palaco kaj komencis vivi en ĝi por ĉiam. Sen firma volo esti feo, Wugang estis kondamnita haki la cinamarbon nefaligeblan en la

Luna Palaco. Tio similas al la greka mito, kiu rakontas, ke Sizifo senĉese rulas rokon ĝis la supro de monto, sed ĝi senfine retroruliĝas de tiu supro. Kvankam la fakto jam pruvis, ke la ombroj en la luno estas nenio alia ol ringforma montaro sur ĝi, kaj ke sur la surfaco de la luno estas neniu viva estaĵo, tamen en Ĉinio iuj maljunulinoj daŭre kredas la belan rakonton kaj deziras, ke la leporo estu transformiĝinto de la luno por eterne.

“LEPORO-AVO” INTER LA POPOLANOJ

La 15-a de la oka monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas la tradicia Aŭtunmeza Festo de Ĉinio, kiu strikte rilatas al la luno, alivorte, al la leporo.

La festo estas grava por la ĉinoj ĝuste pro tio, ke ili alte taksas la gravecon de sezono en agrokulturo. De antikve cirkulas la moro kulti la sunon printempe kaj la lunon aŭtune. Antikvaj ĉinoj trovis, ke la luno forte brilas en aŭtunmezo. Post la 1-a jc, krom kulti la lunon, oni ankaŭ spektis ĝin. Post la 8-a jc la 15-a de la oka monato estis fiksita kiel festotago. Laŭ malnova moro, antaŭ la festo tiuj, kiuj vojaĝas, komercas aŭ lernas aliloke, devas reveni hejmen por manĝi lunkukon (ronda farĉita kuko preparita speciale por la festo) kaj spekti la lunon kune kun siaj familianoj vespere de la Aŭtunmeza Festo.

Laŭ antikvaj ĉinoj, se la luno estas vualita de nuboj tiuvespere, leporinoj ne gravediĝos, meleagrovoj ne produktos perlojn kaj fagopiroj ne donos nuksojn; se ne, tio signifas riĉan rikolton en la jaro.

Tial, la antikvaj ĉinaj kamparanoj kutime maldormis tiunokte por la festo.

La kulto al la luno havis apartan signifon por virinoj. Fraŭlino faris tion por peti de la leporo, dio de la luno, beni ŝin per bona edzo, kaj edziniĝinto — por peti de la leporo beni ŝin per multaj filoj.

Ĉina mito diras, ke la 15-a de la oka monato estas naskiĝtago de la luno-onjo, kiu decidas la edzecon de la popolanoj. Pro tio gejunuloj ŝatas fari grandan ĵuron sub la luno por solida edzeco dum la vivo. Knabinoj kultas la lunon por esprimi



Leporo-avo kaj leporo-avino (Teatraj figuroj)

sian aspiron pri bela estonteco. Sed ili neniam pensis en si, ĉu la luno-onjo, kiu vivas ĉiam en soleco, kapablas beni la junajn geamantojn.

La blanka leporo estas ankaŭ dio de generado. Leporo estas ege produktema. Ĝuste pro tio, multaj antikvaj ĉinoj, kiuj kredis al la tezo “pli da filoj, pli da feliĉo”, konvinkiĝis, ke la dio de la luno decidas naskadon, kaj adorado al la luno estas fakte adorado al naskado.

Dum kulto al la luno oni nepre kultis la leporon. En Ming-dinastio (1368-1644) oni aĉetis paperfoliojn kun bildo de leporo, kiu starante pistas drogon. Vespere de la Aŭtunmeza Festo ili kultis la lunon en direkto de ĝia leviĝo, kunportante la paperfoliojn, kiujn ili forbruligis fine de la kulto. Post la dinastio en Pekino vendiĝis argilaj leporoj bele farbitaj. Jen antaŭiranto de Leporo-Avo, vaste konata en norda Ĉinio. Antaŭ 40-50

jaroj en Ĉinio aĉetebliis argilaj pupoj kun lepora kapo kaj homa korpo, origine uzataj por kulti la lunon en la Aŭtunmeza Festo kaj poste kiel ludiloj pro sia aminda figuro. Eble pro praktikado de naskolimigo oni ne plu kultas Leporo-Avon, do ĝi estas tre malofte vidata hodiaŭ.

BLANKA LEPORO EN TEATRO

La antikvaj ĉinoj preferis la blankan leporon al la griza kaj nigra. Oni diris: “Leporo povas vivi mil jarojn kaj blankiĝas en la aĝo de 500 jaroj.” Tio signifas, ke la blanka leporo estas prenata kiel longvivulo el ĉiuj leporoj.

En la 12-a jc furoris en suda Ĉinio kvar teatraĵoj, inter kiuj “Lunkulta Pavilono” kaj “Rakonto pri la Blanka Leporo” rilatas al la luno kaj leporo. La antaŭa konigas amaferon kun lunkulto kiel la fadeno kaj la lasta, el popola rakonto, ree prezentas familian renkontiĝon kun blanka leporo kiel la fadeno. Ĝi rakontas, ke pro malriĉeco Liu Zhiyuan servis en

armeo aliloke. Lia edzino Tria Onjo Li, turmentata en la familio de sia patrino, kiu malŝatis Liu pro lia malriĉeco, sendis al li la filon. Dek jarojn poste, Liu Zhiyuan fariĝis eminenta oficiro. Iutage lia filo faris ĉasadon. Persekutante blankan leporon, li renkontiĝis kun sia patrino. Je tio okazis la familia renkontiĝo.

Fakte, leporo estas ne nur bonaŭguraĵo en teatro de Ĉinio, sed ankaŭ bonvenigata rolo en rakontoj kaj karikaturaj filmoj de aliaj landoj. En Disney-ĝardeno estas fame konata leporo kun incizivoj, kiajn havas eminenta piedpilkisto Ronaldo el Brazilo. Ankaŭ la leporo en la rusa karikatura filmo “Leporo, ni atendu kaj vidu!” profunde impresas, ke ĝi ĉiufoje venkas la ruzan lupon. La rakonto “Testudo kaj leporo en vetkuro” montras, ke pro fiereco la leporo perdis la kuron. Ĝi komprenigas la filozofian tezon: La arogantaj trupoj certe malvenkos.

Ĉe la sojlo de la Jaro de Leporo ni deziras al vi ĉiuj feliĉon kaj sukceson. ■



Leporoj (Papertondaĵo)

“Plenkreska filino ne devas resti hejme”

Sha Yexin famas en Ĉinio kiel dramisto. En tiu ĉi artikolo li priskribas sian filinon, kiu studis en Usono kaj revenis Ŝanhajon por viziti la parencojn. Liaj vortoj estas humuraj kaj patrecaj. Li ne nur prezentis al ni modernan ĉinan knabinon, kiu ricevis edukon de la Oriento kaj la Okcidento, sed ankaŭ montris siajn zorgojn pri siaj gefiloj.

Yu Tao

de SHA YEXIN

LERNANTE en elementa lernejo, mia filino foje demandis min:

“Paĉjo, kion signifas ‘plenkreska filino ne devas resti hejme’?”

Mi estis mirigita, ĉar ĝi estas antikva popoldiro, kiu signifas, ke plenkreska filino devas edziniĝi, sed ne longe resti hejme. Ĉu la knabineto, kia ŝi, deziras edziniĝi? Mi demandis:

“Kial vi faras tian demandon?”

“Mi legis ĝin en libro kaj ne komprenas.”

“Cerbumu,” mi devigis ŝin respondi.

Ŝi pensadis kaj respondis kiel al la instruisto en leciono:

“Mi...opinias...ke ĝi signifas, ke plenkreska filino ne devas resti hejme, sed studi en fremda lando.”

Mi ne sciis kion diri.

Tute neatendite, plenkreskinte, mia filino fariĝis studento en usona universitato.

Post 7-jara studado, mia filino estis preta reveni Ĉinion por viziti la gepatrojn. Mi pensis, ke ŝi certe multe ŝanĝiĝis. Ĉu ŝi portos sunokulvitrojn kun maĉgumo en la buŝo kaj parolos al mi nur angle?

En la flughaveno mia edzino

kaj mi atendis ŝajne tre tre longe. Tamen fakte nur unu horon. La aviadilo kun mia filino atingis akurate. Ni ne trovis ŝin kaj maltrankviliĝis. Subite aŭdiĝis intima voĉo — “Paĉjo! Panjo!” Jen apude staris nia filino. Mia edzino kaj mi ekscitiĝis kaj forte brakumis la filinon.

Ŝi ja multe ŝanĝiĝis — plenkreska junulino en blua T-ĉemizo kaj nigraj ledaj ŝuoj kun dika plandumo. Ŝi aspektis ĉin-devena usonanino.

Survoje mi demandis, kiom longe ŝi restos en Ŝanhajo. Ŝi respondis, ke ŝi deziras iom pli longe. Mi estis ĝoja, tamen dubis, ĉu ŝi al kutimiĝos al loka vivo, vivinte en fremda lando multajn jarojn. Ĉu okazos “konflikto inter la orienta kulturo kaj la okcidenta” inter mi kaj mia filino?

Informiĝinte pri la malsaniĝo de la avo, ŝi tuj rapidis al la hospitalo kun sia patrino. Pri tio mi estis tre kontenta. Poste ŝi multfoje vizitis siajn geavojn. Ŝi ofte akompanis sian patrinon en butikumo kaj preparo de manĝaĵoj. Vespere, ni tri kune rigardis televidan programon, ĝuante la familian etoson.

Foje mia edzino demandis ŝin: “Ĉu via frato havas amatinon en Usono?”

“Li deziras edziĝi al nigrulino.”

“Aĥ!” La patrino surpriziĝis.

“Panjo, ĉu vi inklinas al rasa diskriminacio?” diris la filino. “Juna nigrulino estas tre svelta kaj bela.”

“Mi ne havas rasan diskriminacion,” mi aldonis. “Mi estas maltrankvila nur pri la estonteco — se ili naskos nigran bebon kaj petos nin flegi la nepon. Mi ne scias, kion fari.”

“Simple laŭ la metodo, per kiu vi flegis min kaj mian fraton,” diris la filino.

Ni ĉiuj eksplodis de rido.

Je la komenco mi timis, ke ŝi ĉiam parolas la anglan lingvon. Antaŭ nelonge iu taksisto rakontis al mi, ke iu fraŭlino prenis lian taksion kaj parolis ekskluzive angle. Tre malfacile li komprenis ŝian celon. Sed tuj post elaŭtiĝo, ŝi flue parolis la ŝanhajan dialekton kun iu sinjoro. La ŝoforo estis tre bedaŭra pri tio. Mia filino vivis en alia lando 7 jarojn, tamen ŝi parolis kun ni ĉiam ĉine, eĉ neniam angle.

La plej ĝojinda por mi estas tio, ke ŝi daŭre amas sian patrolandon. Mi konas iujn revenintajn el aliaj landoj, ili malŝatas ĉion en sia hejmloko. Mia filino ŝajne amas sian hejmlokon pli ol antaŭe. Foje ŝia edzo telefone demandis, kiam ŝi revenos al Usono. Ŝi petolis:

“Sinjoro, ne ĝenu min. Mi vivas feliĉe en Ŝanhajo. Mi ne veturos tien.”

Ankaŭ ŝia frato demandis pri Ŝanhajo, ŝi diris:

“La urbo multe ŝanĝiĝis, revenu rigardi.”


Kaj nia filo vere planas reveni. Tiam Venos alia festo de mia edzino kaj mi! ■

Ĉina junularo statistike

Ekde tiu ĉi numero, de tempo al tempo mi prezentos statistikojn pri ĉina junularo. Mi esperas, ke la ciferoj kaj bildoj helpos vin pli bone koni ĉinan junularon. Apude estas rezulto de enketo al 510 ge-junuloj 13-19-jaraj en Pekino kaj Ŝanhajo.


Yu Tao

1. Ĉu vi deziras pli da ŝancoj ludi, paroli, kontaktiĝi kun viaj gepatroj?




- 1 56.5% nun estas sufiĉe bone
- 2 38.1% deziras pli multe
- 3 5.4% nun estas tro multe

2. Kiel vi taksas vian familion?



- 1 40.6% tre feliĉa
- 2 40.4% relative feliĉa
- 3 14.5% pli-malpli feliĉa
- 4 4.5% tre malfeliĉa aŭ ne feliĉa

3. Ĉu viaj gepatroj alte taksas vian opinion pri grava afero?



- 1 50.5% preskaŭ ĉiam
- 2 46.8% nur iam
- 3 2.7% neniam

Libroj eldonitaj de Ĉina Esperanto-Eldonejo

(1994-1996)

Analektoj de Konfuceo

Konfuceo. Trad. Wang Chongfang. Beijing, 1996. 114p. 21x15 cm. Bind.

La Konfuceana Biblio: kolekto de diroj kaj faroj de Konfuceo kaj liaj disĉiploj kiuj prezentas la vidpunktojn de Konfuceo pri politiko, filozofio, edukado, literaturo, arto, etiko, principoj de morala konduto.

Prezo: 14,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

Bakin kaj Esperanto (en la ĉina lingvo)

Komp. Xu Shanshu. Beijing, 1995. 436p. 22x14 cm. Ilus.

Bakin estas fama ĉina verkisto kaj tradukisto, kaj ankaŭ veterana esperantisto. La libro konsistas el tri partoj: verkaĵoj, tradukaĵoj kaj leteroj. Al la libro estas aldonitaj kronologiaj notoj pri la aktiveco de Bakin, kiuj estas valoraj por koni la rilatojn inter Bakin kaj Esperanto.

Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

Ĉina ceramiko

Zhao Hongsheng. Trad. Wang Chongfang. Bei-



jing, 1994. 260p. 18.50x12cm.

Ĉinio estas hejmlando de porcelanaĵoj. La ceramika produktado de Ĉinio komenciĝis en neolitiko. La libro detale konigas la historion de la ĉina ceramiko.

Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

222 simplaj versaĵoj por komencantoj

Originale verkita de Laŭlum. Beijing, 1995. 127p. 18x11cm.

Riĉa kolekto da etaj facile lerneblaj kaj memoreblaj poemoj, precipe por lernejoj, sed frandeblaj por ĉiuj aĝoj.

Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

De lernanto al praktikanto de Esperanto

de HUANG YINBAO

LERNANTO KAJ INSTRUANTO

Mi ekkonis la nomon de Esperanto en mia studenta jaro. Iutage en la jaro 1980, la instituta radiostacio disaŭdigis sciojn pri Esperanto kaj dank' al tio mi unuafoje sciis la internacian lingvon Esperanto. Mi serĉis Esperantajn lernolibrojn dum tri studentaj jaroj, sed ne trovis.

Post mia diplomiĝo en 1983, mi ricevis lernolibron de mia amiko kaj komencis lerni Esperanton. Li instruis min du semajnojn en libera tempo. Post lia transloĝiĝo mi lernis ĝin mem.

En 1984 mi ekscipovis libere legi kaj skribi. Mi havis multajn korespondantojn el pli ol 10 landoj. Tagon post tago, mi sentis bezonon ekparoli en Esperanto, tamen en mia loĝloko Jingchuan-gubernio de Gansu-provinco mankis esperantistoj. Mi pensis, ke mi devas okazigi E-kurson por kulturelajn kelkajn samideanojn. Jen mi fondis senpagan Esperantan kurson en mia urbeto. Mi ne atendis, ke 70 personoj partoprenis la kurson. Plejparto de ili sukcesis en la ekzameno. Post kelkaj monatoj mi fondis la duan kurson, kiu ne tiel sukcesis kiel la unua, tamen ĝi donis al mi treege utilan atentigon. Post kelkaj semajnoj dum la dua kurso, iu saĝa mezaĝa kursano, kiu elstare lernis Esperanton, demandis: "S-ro Huang, mi trovis, ke vi bone posedas Esperanton. Ĉu vi iam uzis ĝin?" Mi jesis, menciante mian

korespondadon kun multaj eksterlandanoj. Kiam li sciis, ke mia uzo estas nur en korespondado, li forlasis Esperanton. Li ne ŝatas korespondadon, ĉar lia celo estas uzi Esperanton en lia laboro. Multaj kursanoj sekvis lian ekzemplon, kvankam kelkaj daŭre lernis ĝis la



Huang Yinbao

fino de la kurso. Tagon post tago, miaj kursanoj el la du kursoj tute forlasis Esperanton. Kompreneble, la kialo estas en tio, ke ili ne sciis, kiel uzi Esperanton en sia laboro. Tio estis forta bato por mi.

Ankaŭ mi ne uzis Esperanton en mia laboro krom korespondo. Ŝajnis al mi, ke Esperanto estas nur amuzilo. De tiam, unuflanke mi serĉis novan vojon ekzerci aŭdadon kaj parolon, aliflanke provis praktiki Esperanton en mia laboro — agrikultura kaj koncernaj sci-

encoj.

AŬSKULTANTO DE ESPERANTA DISAŬDIGO

Mi, kiel izolita esperantisto, ne havis ŝancon ekzerci mian Esperantan parolon. Mi vidis, ke multaj anglalingvaj instruistoj en Ĉinio parolas ne libere en la lingvo. Pro tio mi supozis, ke ni ĉinaj memlernantoj eble ne kapablas flue paroli en Esperanto. En somero de 1990 mi partoprenis la 3-an Internacian Akademian Konferencon de Scienco kaj Tekniko en Esperanto en Pekino. Profitante de la ŝanco, mi atingis Pekinon pli frue je unu semajno kaj 8-foje vizitadis Esperantan kurson gvidatan de s-ro Li Shijun en la Pekina Radio-disaŭdiga Instituto. Mi vidis, ke la gestudentoj en la Esperanta kurso, kiuj lernis Esperanton nur 5 monatojn, jam flue parolis kaj bele respondis demandojn de la instruisto. La instruisto instruis nur en Esperanto. Tamen mi, kiu lernis nian lingvon jam 5 jarojn, malbone parolis kaj aŭskultis. Li Shijun proponis, ke mi provu aŭskulti Esperantan disaŭdigon de la Ĉina Radio Internacia. Dum la konferenco mi konatiĝis kun multaj eminentaj esperantistoj.

Post la konferenco mi komencis konstante aŭskulti Esperantan disaŭdigon de la Ĉina Radio Internacia. En la komenco mi komprenis preskaŭ nenion de la disaŭdigo, kvankam multaj vortoj ŝajnis esti konataj. Ofte okazis, ke kiam mi cerbumis pri la unua frazo, la geparolistoj jam eldiris aliajn vortojn. Tamen mi daŭrigis la aŭskulta-

don kaj finfine mi komprenis la tuton. Mi preskaŭ ĉiutage aŭskultis Esperantan disaŭdigon. Kiel ŝtatoficisto, mi tre ŝatas aŭskulti novaĵojn el Ĉinio kaj la mondo. Tamen la disaŭdigo de la novaĵoj de la Ĉina Centra Televido (CCTV) okazas en la sama horo kun la E-elsendo. Mi do elektis la Esperantan disaŭdigon. Per la Esperanta disaŭdigo mi unuflanke ĝuis la fluan kaj belan E-parolon, aliflanke aŭskultis ankaŭ gravajn novaĵojn ĉinajn kaj alilandajn. Antaŭ kelkaj monatoj mi aĉetis bonan radioaparaton, per kiu mi nun aŭskultas la disaŭdigon vespere kaj matene. Tiel mi aŭskultas la Esperantan disaŭdigon ankaŭ en vojaĝo.

PRAKTIKANTO DE ESPERANTO EN AGRIKULTURO

Por praktiki Esperanton en mia fako, mi skribis al miaj korespondantoj kaj petis ilin sendi al mi bonajn semojn, ĉar mi celis fari sciencan eksperimenton per la semoj. Baldaŭ pluraj bonkoraj esperantistoj reagis por mia projekto. Ili publikigis anoncon pri mia projekto en diversaj Esperantaj gazetoj. D-ro So Gilsu, eksestrarano de UEA, eĉ disdonis la anoncon al gravaj eldonaĵoj. Mi fine kolektis 53 variojn de diversaj semoj el pli ol 20 landoj. Esplorante la semovariojn, mi sukcese selektis bonan kulturvarion de akvomelono. Laŭ leĝo de Ĉinio, mi rajtas nomi la novan semon. Mi do nomis ĝin "verda stelo". La akvomelono "verda stelo" estis produktiva, sukoriĉa kaj bongusta. Pro la sukcesa laboro, la scienca departemento de la loka registaro asignis 4 000 juanojn por subteni mian laboron. Ankaŭ bonkoraj esperantistoj multe helpis min en diversaj manieroj. En 1995 la scienca departemento oficiale kunvenis por ekspertizi la frukton "verda stelo", aprobis mian sciencan atingon kaj premiis min je la scienca atingo.

Mi publikigis nemalmultajn sciencajn referaĵojn dum 15 jaroj, tamen de 1994 mi verkis sciencajn

raportojn nur en Esperanto. Ĝis nun mi publikigis 8 sciencajn artikolojn en SCIENCA REVUO kaj INTERNACIA AGRIKULTURO. Mi skribis ankaŭ manuskripton "Akvomelono kaj kultivado" en Esperanto.

Antaŭ 1993 en nia gubernio kamparanoj multe kultivis poligonon. Tamen en nia regiono ne estis fabrikita manĝaĵo el poligono. Mi skribis al japana esperantisto Acusi Hoŝida, kiu iam helpis min en semokolektado. Mi petis helpon de li. Li aperigis mian petleteron en loka Esperanta gazeto. Li kelkfoje vizitis rilatajn fabrikojn, petis japanlingvajn materialojn pri sekigitaj poligonaj vermiĉeloj. Li mem esperantigis kaj sendis ilin al mi. Mi transdonis la materialojn al gubernia manĝaĵo-fabriko. Baldaŭ la fabriko produktis sekigitajn poligonajn vermiĉelojn. Ĉi tie mi ŝuldas grandan dankon al estimata s-ro Acusi Hoŝida.

En 1996 mi ricevis premion titolitan "Tutlanda Scienc-Teknika Laboranto" de la Scienc-Teknika Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko. Mi kredas, ke la premio devenis unuflanke de mia diligenco en scienca laboro, aliflanke de Esperanta praktiko en mia laboro.

GVIDANTARO DE AGRIKULTURA E-MOVADO

Kvankam mi ion faris en Esperanta praktiko, tamen nur en malvasta sfero. Mi profunde sen-

tis, ke sola agronomo-esperantisto povas fari nur malmulte en la agrikultura Esperanto-movado. Ni esperantistoj devas unuiĝi, asociiĝi kaj kunlabori. Dum longa tempo, mi serĉis E-parolajn kunlaborantojn en scienca afero. Mi trovis iujn, tamen tre malmultajn. Mi pensas, ke ankaŭ aliaj esperantistoj serĉis samfakulojn. Tial mi kaj kelkaj eksterlandaj samfakuloj fondis la Internacian Agrikulturan Esperanto-Asocion (IAEA) en la fino de 1996. De la jaro 1997, mi funkcias kiel ĝia ĝenerala sekretario kaj ĉefredaktoro de la revuo INTERNACIA AGRIKULTURO. La celo de la asocio estas disvastiĝi kaj praktiki Esperanton en agrikulturo, hortikulturo, forstkulturo, brutobredado, akvoproduktaĵaj aferoj, planta protekto, ekologio kaj agrikulturaj biologio, kemio, meteologio, medioprotekto, ekonomio, edukado kaj rilataj sciencoj, eĉ kamparana turismo. Por realigi la celon, la asocio publikigis la agrikulturajn projektojn por Kampanjo 2000 (detalaj enhavoj de la projektoj aperis en la revuo "INTERNACIA AGRIKULTURO" en la 1/2-a numeroj de 1998). La celo de IAEA estas kaj estos mia celo en la venontaj jaroj kaj sur la verda vojo.

(Adreso: Huang Yinbao, Internacia Agrikulturo, Jingchuan-xian Kewei, CN-744300 Jingchuan, Gansu, Ĉinio. Retadreso: agrikultura@Esperanto.nu) ■

Kunlaboro petata

La Hangzhou-a Komerca Kompanio "Esperanto-Mar" volas kunlabori kun ĉiuj E-organizoj kaj esperantistoj pri komerca traktado, varo-perado, poŝta aĉetado kaj interŝanĝo de varoj.

Adreso: Direktoro Qiu Xirong, Jiefang Lu 24, CN-310009 Hangzhou, Zhejiang, Ĉinio

Telefono: +86-571-7071705

Telefakso: +86-571-7035995



La aŭtoro

Apud la rivero, hazarde (Mikronovelo)

de S.E. BULLO (Italio)

KIAM falis la varmeta somera vespero, sinjoro Marko ofte amuziĝis promenante laŭ padoj apud la rivero.

Granda paco ĉirkaŭe disvastiĝis... Kantis birdoj kaŝitaj sub la folioj de longaj branĉoj.

Li rigardis la strekojn ruĝajn, flavajn kaj lazurajn, kiuj estas naskiĝintaj en la ĉielo. Li membris lastajn feliĉajn tagojn.

Tiam li estis kun la karaj gepatroj... (Nuntempe li estas tute sola. Ili ne plu vivas.) Tamen, ankoraŭ kun malĝojaj pensoj Marko konsideris tiun ĉi plej belan momenton de la tago. Jes... li estis modesta oficisto, sufiĉe juna kaj kontenta pro sia laboro.

Li donis prunte librojn al legantoj kaj poste, kiam finiĝis la horaro de la biblioteko, li remetis zorge la volumojn sur la librobretajn.

Tio ĉi estis lia tuta rolo.

Tamen iafoje, se en la biblioteko estis malmultaj personoj, li povis iom legi, iom da iom.

Tiel, iafoje, sinjoro Marko trovis manieron de interparolado kun aliaj legantoj. Precipe kun sinjorino Liala, kiu volonte parolis kun li, afabla junulo, bone parolanta kaj pli bone aŭskultanta.

Sen vera intenco, la gejunuloj komencis provi amajn sentojn unu al la alia... sed neniu kuraĝis tion klarigi. Tamen, hazarde okazas tio, kio frue aŭ malfrue okazos.

Estis kvieta vespero. Sinjoro Marko laŭkutime promenis sur padoj laŭ la rivero.

Tio estis pura akvo en varma somero.

Ĉe la bordo estis blankaj ŝtonoj, sur kiuj oni povis sidi kaj paŭzi.

Sinjoro Marko sidis sur ŝtono kaj vidis alvenantan sinjorinon Liala. Ŝi surmetis belan ĉemize-

ton kun longa jupo, kiu ŝajnis flugeti ĉirkaŭ ŝi.

Sinjoro Marko neniam vidis tiel belan virinon... Li restis senspire dum Liala lin salutis: "Bonan vesperon... kion vi faras tute sola, sinjoro Marko?"

Li respondis malrapide, ĉiam ŝin fiksante: "Bonan vesperon!"

Ŝi trankvile eksidis apud li.

Kiu prenis sian tutan kuraĝon kaj komencis paroli pri ia temo? "Turandot" (pri kiu antaŭ nelonge li legis) al li ŝajnis bona teatra temo por interparoli...

Liala ridetis pro lia embaraso kaj diris multajn interesajn aferojn.

"Mi ne komprenas," ŝi diris, "kial bela, afabla kaj eminenta princino trovis tian krudan manieron por nei sian manon al edziniĝo?"

"Vere," li enpense respondis, "kiu ne solvis enigmojn, kiujn Turandot proponis, per sia vivo pagis... Tiel multaj princoj mortis... Fine, tamen venis iu, kiu solvis la enigmojn kaj prenis per amo la junulinon vere viglan sed timega. Estis bela edziĝo."

Sinjorino Liala atente aŭskultis la lastajn vortojn, kiujn Marko sen preta intenco diris kun forta akcento.

"Al vi la historio de Turandot multe frapis en la menso kaj en la koro," diris afable Liala.

"Vere. Mi pri tio ankoraŭ pensas."

"Eble vi havas enigmon, kiun oni ankoraŭ ne solvis?" duondiris Liala per drolota voĉo.

"Ne bezonas esti granda princino," malĝoje respondis mallaŭte Marko, "kia ajn junulino povas esti kruela per amo..."

"Ho, kion vi diras... Marko?"

Liala senvole kore sin konfesis.

Marko rigardis ŝiajn helajn okulojn, en kiuj amon li legis.

Jam la vespero foriris, unuaj noktaj ombroj alvenis...

Liala kaj Marko man-en-mane revenis malrapide al la silenta, malluma urbeto... ■

Sankta Valentino kaj ĉokolado

de HORI JASUO (Japanio)

LA 14-a de februaro estas la tago de Sankta Valentino. Oni festas ĝin en kristanaj landoj. Sed ankaŭ japanoj, ne kristanaj, “festas” la tagon. Antaŭ 30 jaroj neniu konis ĝin, sed iom post iom la tago fariĝas konata, dank’ al la klopodo de ĉokolado-firmoj. La firmoj interpretis la tagon, dirante, ke fraŭlinoj estas speciale permesataj konfesi sian amon al fraŭlo, donacante ĉokoladon. Re-

zulte, tiu ĉi moro tiel populariĝas, ke dum la tago oni konsumas trionon de la tuta ĉokolado vendata dum la jaro.

Por la tago oni aĉetas ne nur unu, sed plurajn ĉokoladojn samtempe — unu multekostan kaj kelkajn malkarajn. La multekosta estas nomata *Honmei-ĉoko*(lado). *Honmei* laŭvorte signifas “la plej esperhavan kandidaton”, sed ĉi tie signifas la fraŭlon. Laŭ statistiko, fraŭlino elspezas 1 500 enojn (140 dolarojn) por *honmei-ĉoko*. Por kamufli sian objekton de amo, ŝi

disdonas *giri-ĉoko* al viroj ĉirkaŭaj. *Giri* signifas “nevolontan kaj duondevan konduton por glatigi rilatojn inter homoj”.

Kapitalismo senĉese akcelas konsumadon. Ĝi same kreis la 14-an de marto (“Blanka Tago”), kiam ricevintoj de ĉokolado devas redoni trioblaprezan donacon al donacintoj. En magazeno en Tokio lastan jaron vendiĝis 10 000 kalsonetoj dum nur du tagoj antaŭ la Blanka Tago kiel re-donaco al *honmei-ĉoko*-fraŭlino. ■

El “Raportoj el Japanio”

LU CHUANBIAO:

Memore al Charles Ghiselin

LA 19-an de januaro 1989, belga esperantisto s-ro Charles Ghiselin forpasis. Jam dek jaroj pasis, tamen ni ne forgesis lin. Li ankoraŭ vivas en nia memoro. Por esprimi nian profundan sopiron al s-ro Ghiselin ni dediĉas al li tiun ĉi artikoleon.

S-ro Ghiselin heredigis al ni ne nur sian posedaĵon kiel fonduson por nia afero, sed ankaŭ spiritan riĉaĵon — amon al Esperanto, aspiron al Esperan-

to kaj dediĉon al Esperanto.

S-ro Ghiselin estis florkulturisto kaj vivis de kulturo kaj vendo de floroj. Kvankam li ne enspezis multe, tamen li amis sian okupon.

S-ro Ghiselin arde amis la noblan aferon de Esperanto, kiun li lernis,



Charles Ghiselin

praktikis kaj disvastigis kun espero, ke pli multaj posedos ĝin. Li desegnis du grandajn verdajn stelojn sur la ĉirkaŭmuro de sia loĝejo por disetendi la samideancecon al vizitantoj.

S-ro Ghiselin estis malavara al nia afero de Esperanto. Li kredis, ke Esperanto ne konas distingon de nacioj kaj landlimon. Pro tio li donis sinceran helpon al ni ĉinaj esperantistoj. Liaj helpemo kaj aspiri al Esperanto kuraĝigas nin por plue antaŭenpuŝi nian movadon kaj pli diligente labori por la interna ideo de Esperanto. ■

Helpanto por koni Japanion

de WANG HANPING

Raportoj el Japanio, HORI Jasuo (Japanio). Libroteko Tokio, dec. 1997. 205 p. Prezo: 2200 JPY + 110 JPY (imposto).

Estas popoldiro, ke la plej felîca viro loĝas en brita domo, dungas francan kuiriston kaj havas japanan edzinon. Tio montras, ke por multaj homoj japaninoj estas tre mildaj kaj afablaj — post edziniĝo ili ne plu laboras ekstere, sed tutanime prizorgas la familion, servas al la edzo obeeme. Tamen, leginte la libron “Raportoj el Japanio” de s-ro HORI Jasuo, mi trovis, ke tiu opinio pri Japanio ne plu havas aktualecon.

Nun multaj japanaj fraŭlinoj havas postenon. Kvarono de ili deziras daŭre labori ĝis emeritiĝo. Tiuj japaninoj havas stabilan enspezon, plejparto de ili deziras edziniĝi kaj patriniĝi, iuj el ili ne havas tian deziron, sed ŝatas familion sen edzo. En la lastaj 10 jaroj japanaj virinoj multe ŝanĝiĝis. Amaso da similaj ŝanĝiĝoj priskribitaj en la libro donas al la legantoj novan impreson pri Japanio.

Pri Japanio, oni facile memoras la militon antaŭ duonjarcento kaj la rapidan ekonomian disvolviĝon post la milito. Unu el la du motivoj de la aŭtoro por verki tiun libron estas: “doni informon pri Japanio al la mondo”. De aprilo 1991, en ĉiu 15-a kaj ĉiu 30-a, li verkis raporton. Li sendis la raportojn al amikoj tra la mondo, ankaŭ ili sendis koncernajn raportojn al li. La interŝanĝoj pli amiki-

Aprilo 1991 - Aŭgusto 1997

Raportoj el Japanio

de
HORI Jasuo



LIBROTEKO TOKIO

gis ilin. Li selektis 94 raportojn verkitajn de li inter aprilo 1991 kaj aŭgusto 1997 kaj kronologie aranĝis ilin en la libro kun 12 leteroj kaj raportoj de liaj amikoj.

S-ro HORI Jasuo finis sian studon en la Universitato Kioto en 1965. Longe li instruis la anglan lingvon en altlernejoj. Ekde 1993 li estas estrarano de la Japana Esperanto-Instituto, ekde 1994 ĝenerala sekretario de la Esperanto-Ligo de Kantou. Li partoprenis UK ĉiufoje ekde 1993. Kiel lingva instruisto kaj aktiva e-isto, li konas la bezonon de E-legantoj. En la antaŭparolo de la libro, modeste li diras, ke la unua motivo verki la libron estas: “plibonigi mian kapblon de Esperanto koncerne skribadon kaj vortuzadon”. Sen

luksa lingvaĵo liaj raportoj estas klaraj kaj taŭgaj por legantoj de diversaj niveloj. Per sia sperto la aŭtoro komencis la raporton de socia fenomeno, aŭ statistiko, aŭ evento. Li interese rakontas, koncize analizas, foje montras sian opinion. Sub lia plumo multaj japanaj aferoj fariĝis facile kompreneblaj por la legantoj. Kaj ĉiu raporto estas ĝenerale 1-2-paĝa.


“Raportoj el Japanio” priskribas diversajn flankojn de Japanio — naturaj fenomenoj: vulkana erupcio kaj tertremo; sportoludoj: sumou kaj bazpilko; festoj: festo por knabinoj kaj Sankta Valenteno; socio: geedziĝo, familio, ĉiutaga vivo, kredo, eduko, industrio, agrikulturo, medio, politiko... Li tuŝas ne nur la luman flankon, sed ankaŭ la malluman. La enhavoriĉa libro donas panoramon pri Japanio. Multfoje li tuŝas la Duan Mondmiliton, ekz. “konsolvirinoj” kaj atombombo. Suferintaj de la milito, japanoj pli amas la pacon, tiel estas multaj kantogrupoj de la Naŭa Simfonio de Beethoven (ankaŭ la aŭtoro estas korusestro de unu el ili). Laŭ la vojo de tempo, la eventoj Veneno en Vagonoj de Tokio, Granda Tertremo en Hanŝin, Sekretoj de Aum, knabino perfortita de usonaj soldatoj... reaperas antaŭ ni.

Per allogaj temoj, realaj priskriboj kaj originalaj analizoj la aŭtoro ĉiĉeronas nin en Japanio en la 90-aj jaroj. La delikate presita kaj ilustrita libro (la kovrilopaĝo estas pentraĵo de la aŭtoro mem) donas al ni pli da plezuro en legado. Mi deziras lian novan verkon. ■

ĈINIO

● La 4-5an de sept. 1998, la Esperanta grupo "Bona Amiko" de Pekino okazigis en la Pekina Filma Instituto koncerton inkl. Esperantajn kantojn, dancojn, deklamadon kaj segil-muzikon, dume okazis ekspozicio pri poŝtmarkoj de Esperanto.

● Memore al la 170-a datreveno de la naskiĝo de L.Tolstoj (1828-1910), fama rusa verkisto kaj subtenanto de Esperanto, la ĉina societo "Amikoj de Esperanto" emisiis memorkoverton la 9-an de sept. (Qin Kaiji)



纪念著名俄国作家和世界语热情支持者托尔泰诞生一百七十年



北京77号信箱
中国报道社

中国世界语之友会
北京百万庄路21号 (邮政编码: 100071)
邮政编码

Memorkoverto por la 170-a datreveno de la naskiĝo de L. Tolstoj

POLLANDO

● Lodzo de Pollando kaj Tianjin de Ĉinio estas ĝemelaj urboj. Memore al la 90-a datreveno de Esperanto-movado en Lodzo, tri personoj de la Tianjin-a Esperanto-Asocio laŭ invito de la Lodza Esperanto-Asocio vizitis Lodzon de la 22-a de aŭg. ĝis la 3-a de sept., dume ili ankaŭ partoprenis la 29-an Tutpollandan Esperanto-Kongreson.

DANIO

● En la kadroj de Martinus-Instituto okazis du Esperanto-semajnoj en urbeto Klint inter la 9a kaj la 22a de aŭgusto 1998, kaj ĉeestis 40 personoj el Danio, Sve-

dio, Rusio, Ĉeĥio, Hungario, Rumanio, Argentino kaj Usono. La duono (pli ol 20) sekvis la instruadon pri la kosmologio kaj la alia duono studis la lingvon Esperanto. En 1999 estos du Esperanto-semajnoj en Martinus-Centro, Klint, inter la 8a kaj 21a de aŭgusto, tuj post la UK en Berlino. Oni povos ĉeesti unu aŭ du semajnojn laŭplaĉe. (Ole Therkelsen)

KUBO

● La Tria Nacia Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio okazos inter la 11a kaj 13a de marto 1999 en Havano. Sojle al la tria jarmilo la kongresa programo enhavos kernajn temojn, kiuj certe altiros ĉies atenton per klerigaj eroj, prelegoj, rondaj tabloj, turismado kaj artaj vesperoj, kiuj prezentos al la kongresanoj maturan kaj samtempe junan movadon. Kuba Esperanto-Asocio invitas vin partopreni la kongreson kaj organizos por eksterlandaj kongresanoj antaŭ- aŭ

postkongresan restadon por turistoj, viziti interesajn lokojn, ekspresajn kursojn kaj aliajn laŭ mendoj. Informu vin pere de iliaj: Telefono: +53-7-404484, 401364 kaj 338729; Fakso: + 53-7-338729; Retpoŝto: kubesp@mail.infocom-etecsa.cu.

(Kuba Esperanto-Asocio)

UKRAINIO

● En urbo Odeso, sude de Ukrainio, inter la 18a kaj 25a de julio 1998 okazis vica 71-a Kongreso de SAT. Ĝin partoprenis pli ol 200 personoj el 22 landoj de la mondo. Krom kutimaj laborkunsidejoj kaj artaj vesperaj programeroj, oni aranĝis ankaŭ plurajn

ekskursojn tra la urbo kaj vizitis apudajn regionojn kaj monumenton L. Zamenhof en korto de la centra strato Deribasovskaja. (Dmitrij Cibulevskij)

BRAZILIO

● Zamenhof-piedestalo en la parko de varmaj akvoj de Barra do Garcas estis inaŭgurita en la 22-a de aprilo 1995, okaze de la solenaĵoj omaĝe al la tutmonda Tago de la Tero. S-ano Ciro Gomes de Freitas lerte ellaboris skizon por ke la piedestalo fariĝu monumento en la sama parko. Por pli forte entuziasmigi ilian urbestron bonvolu leterumi aŭ sendi pk-on al li: Dr. Wanderley Farias, Prefeitura Municipal, 78600-000-Barra do Garcas MT, Brazilo. (Amarilio Carvalho)



Zamenhof-piedestalo en la parko de varmaj akvoj de Barra do Garcas

“Ĉina princino” revenis

Teksto de LI LIANG

Fotoj de FENG JIN

LA opero “Turandot”, ludita en Pekino septembre de 1998, eble havas la plej profundan signifon inter la pli ol 100 versioj ne nur pro sia majstro-direktisto Zubin Mehta, sia fama ĉina reĝisoro Zhang Yimou, sia Festa Orkestro de Florenco de Italujo, siaj invititaj mondfamaj operaj artistoj, sed ĉefe pro tio, ke la artistoj realigis la revon: ĉina princino Turandot revenu hejmen.

La klasika opero rakontas belan rakonton: kun amo la bela ĉina princino Turandot prezentis tri enigmojn al tiuj alilandaj princoj, kiuj petis ŝian manon, kaj decidis edziniĝi al tiu, kiu povas solvi la enigmojn. La malsukcesintoj devas ricevi mortpunon. Finfine Calaf, princo de Tatarujo, malaperigis la malamon de la princino per saĝo kaj amo. Fakte spektantoj ŝatas la misteran orientan kulturon pli ol tion, kion priskribas la opero.

TEATRO DE REVO

La opero “Turandot” de fama itala komponisto Giacomo Puccini estis verkita en la 20-aj jaroj de tiu ĉi jarcento, kaj en la lastaj 70 jaroj ĝi ofte aperis sur scenejo kiel okcidenta klasika opero. La rakonto pri ĉina princino revigas entuziasmajn kaj ludemajn italojn pri la antikva orienta Ĉinio. Ĉi-foje ili volis realigi la revon de Puccini kaj ankaŭ de si mem. La italaj artistoj konstruis la scenejon en la Imperiestra Palaco. Por tio ili longe planis. En 1993 kaj 1994 la Pekin-opera Teatro estis dufoje invitita al Italujo por prezenti la pekinan operon “Turandot”. En la somero de 1997 du mastroj, Zubin Mehta kaj Zhang Yimou, renkontiĝis en Florenco por kunlaboro.

Nur kiam la opero venas al la hejmloko de la princino, la ludistoj povas ludi pli signifoplene.

Zhang Yimou neniam rigardis la okcidentan operon antaŭe, kiel filma reĝisoro li sentis



Zubin Mehta

premon, tamen li konis la vojon al sukceso. Li diris: “Ni devas respekti scenejan efekton de la opero kaj emfazi rigardindecon, por ke oni ne nur aŭskultu muzikon, sed ankaŭ komprenu la enhavon.”

SENDORMA NOKTO

Zhang Yimou diris: “La opero estas verkita de italo, Ĉinio estas nur fono...”

Malsame kiel la itala “Turandot”, la ĉina “Turandot” sur fono de Ming-dinastio (1368-1644) havas pli multe da ĉinaj karakteroj, ekz. tamburo kaj gongo. Zhang anstataŭigis timigan koloron per romantika situacio kun amo kaj malamo. Tial Turandot fariĝis virino plena de amo. En la antikva palaco la ama opero ludata de la okcidentanoj elspiras antikvan orientan romantikecon.

En la 2-hora prezentado aŭdiĝis ĉina popola kanto “Jasmena Floro”.

De la dua akto la opero eniris en kulminon. Turandot elmetis tri enigmojn, la laŭta kantado de princo Calaf sonoris tra la palaco.

Kiam leviĝis la klasika melodio “Sendorma nokto”, venis kulmino. Antaŭ tagiĝo la princino deklaris ke la princo nomiĝas “Amo”. Malamo malaperis. Je la fino la spektantoj tondre aplaudis. La silentema Zubin Mehta diris, ke prezenti la operon en la Imperiestra Palaco estas lia plej granda honoro.

WEI MINGLUN KAJ LIA ĈINA PRINCINO

Zhang Yimou kun bedaŭro diris: “Kiom ajn ni donis ĉinajn ecojn al la opero, ĝi restas okcidenta.” Tamen fama ĉina dramisto Wei Minglun forpelis la bedaŭron.

Kiam “Turandot” de Zhang Yimou estis prezentata, “Ĉina princino Turandot” de Wei Minglun sursceniĝis. En 1993 Wei adaptis ĝin al pekina opero, ĉi-foje ĝi aperis en formo de Sichuan-a opero.


La versio de Wei havas pli da ĉinaj karakteroj. Li opinias, ke ju pli ĝi estas tia, des pli

ĝi estas viva. Tial lia “Turandot” pli atentis ĉinisman. Lia adapto pli konformas al la estetiko de ĉinoj, pli emfazas la rakonton mem. Tio igis la operon pli ĉinstila, pli teatra kaj pli Sichuan-stila. Kompare kun la okcidenta opero, Wei diris: “La okcidenta emfazas kanton, dum la Sichuan-a — rakonton, la okcidenta estas grandioza, dum la Sichuan-a — leĝera kaj elvokiva.” Wei donis al la opero pli profundan temon: postulata amo estas ĉe vi.

Septembre de 1998 la du operoj samtempe sursceniĝis, tio ĝojigis la spektantojn. Kvankam multekostas la bileto, tamen “Turandot” de Zhang allogas ne nur alilandanojn, sed ankaŭ ĉinojn; ankaŭ tiu de Wei havas multajn spektantojn. Iutage oni forvendis 7 000 biletojn je pli ol unu monato antaŭ la prezentado.


La spektantoj de du operoj diris: “Bonvenon, ĉina princino!” Ĉar la du princinoj estas ĉin-devenaj. Ili donis al ĉinoj ŝancon koni la mondon kaj al la mondo koni Ĉinion. ■

Horo de la opero “Turandot”






La principessa Turandot



Zhang Yimou (la tria de maldekstre) gvidanta dekoradon de la scenejo

Sceno el la opero "Turandot"

La reĝisoro kaj aliaj laborantoj de la opero "Turandot" ĉe la scenejo



Prilep — urbo de Esperanto

de JIANG ZUYUE

TUJ post la 83-a UK mi, invitate de la E-societo LA PROGRESO, vizitis Prilep en Makedonio, urbon de Esperanto. Tie mi restis pli ol 2 semajnojn, multfoje kontaktis membrojn de la E-societo LA PROGRESO, ĉeestis la ceremonion por ĝemeligo de la Changsha-a Esperanto-asocio, Ĉinio, kaj la E-societo LA PROGRESO, Prilep, Makedonio, poste estis akceptita de la tiea urbestro kaj intervjuita de la urba televido. Mi estis multe ĝojigita de la samideaneco kaj amikeco de la gastigantoj. Aparte min surprizis la abundaj fruktoj de la tiea E-movado. La Esperanta biblioteko de LA PROGRESO posedas milojn da E-libroj, kompletojn da E-revuoj, pli ol 20 valorajn E-albumojn. Ĉio estas zorgeme ordigita kaj klasifikita dank' al la multjara penado de la prezidanto de la societo s-ro Metodi Galeski. Krome, en la 20 ŝrankoj konserviĝas multe da diversaj esperantajoj.

Kiam mi promenis en la urbo-centro, mi vidis marmoran Zamenhof-buston altan je pli ol du metroj antaŭ banko kaj montran fenestron pri Esperanto antaŭ ĝardeno apud la strato. Kiam mi vizitis iun esperantiston, sur muro ĉe la enirejo de



La aŭtoro ĉe statuo de Zamenhof en Prilep

lia hejmo vidiĝas la statuo de Zamenhof. Super pordo de okul-kliniko de iu hospitalo pendas ŝildo "L.L. Zamenhof". Al privata aŭtomobilo de esperantisto estas algluita Esperanta emblemo. Tie legiĝas ankaŭ teksto en Esperanto sur toamboŝtono.

Laŭdire antaŭ kelkaj jaroj ekzistis la motelo "Esperanto", la dolĉaĵejoj "Esperanto" kaj "Amikeco", la vendejoj "Libero" kaj "Verda Stelo", la trinkejo "Esperanto", la ŝildo "Mon-ŝangejo" ĉe popola banko, en turisma

agentejo kaj en hotelo, florvendejo "Esperanto" k.a. Bedaŭrinde, pro iuj kialoj poste ili malaperis. Mi miris pri la granda kontribuado al la E-movado far esperantistoj de la PROGRESO-societo, ĉar la urbo Prilep kun nur ĉ. 60 000 loĝantoj estas negranda. Iliaj riĉaj fruktoj estas ja admirindaj kompare precipe kun tiuj de grandaj urboj.

Kun granda ĝojo mi, kiel prezidanto de la Changsha-a E-asocio, subskribis la atestilon por ĝemeligo de la E-societo LA PROGRESO kaj la Changsha-a E-asocio. Ekde tiam eterna estos la samideana amikeco inter esperantistoj de la du Esperantaj organizaĵoj kaj brila la kunlaboro por antaŭenpuŝi la E-movadon de niaj du asocioj. ■

Membroj de la E-societo LA PROGRESO





Kap-ornamo de mjaŭ-a junulo

Vestoj de mjaŭ-oj

Teksto kaj fotoj de XU XIANGJUN kaj LI QIANG

La mjaŭ-oj estas ĉina nacimallimulto kun apartaj trajtoj. Antikve ili vivis en la basenoj de Yangzi-rivero kaj la Flava Rivero. Poste pro batalado ili migris sudokcidenten kaj ekvivis en montaro. Pro malfacila interkomunikiĝo en la nacio aperis multaj branĉoj, ĉiu kun siaj propraj moroj kaj kutimoj, inkl. de la vestoj. Ja estas kolororiĉaj la vestoj kaj ornamaĵoj de la mjaŭ-oj, precipe tiuj de la virinoj.

Jam en la infaneco la mjaŭ-aj knabinoj lernas tajloradon de sia patrino. La vestoj sin dividas en du specojn: la simplaj kaj luksaj. La simplaj estas portataj ĉiutage kaj la luksaj en festoj. La knabinoj devas esti kapablaj en ŝpinado, tinkturado, tajlorado, desegnado, brodado kaj kudrado. Ili kudras vestojn el ŝtofo teks-tinkturita de ili mem. En festo, kun luksaj vestoj la knabinoj dancas sur placo. La apudstarantoj kun ĝuo rigardas iliajn vestojn. En iliaj okuloj kiu bone kudras kaj brodas, tiu estas rigardata kiel saĝa kaj kapabla kaj facile akiras favoron de junuloj.


Arĝentaj ornamaĵoj estas tre ŝatataj de la mjaŭ-aj virinoj. En festotagoj ili portas tiajn ornamaĵojn kaj belajn

vestojn. Sur iliaj kapoj brilas ornamaĵoj, kiaj arĝentaj floro kaj birdo. Ili portas ankaŭ arĝentajn ringojn, braceletojn, kolĉenon, kolringon kaj orelringojn. La belaj arĝentaj ornamaĵoj tintadas ĉe la moviĝo

de la portantoj, kio plibeligas la knabinojn. La ornamaĵoj estas ankaŭ atesto de ilia riĉeco, pro tio en la okuloj de iuj knabinoj, ju pli da arĝentaj ornamaĵoj ili portas, des pli da ĝojo ili sentas.

Danco kun *luŝeng*-oj





En festo knaĵinoj montras vestojn memfaritajn.




Mjaŭ-aj virinoj en festo



Ratino kaj filo



En kunveno



Kap-ornamo de mjaŭ-aj virinoj



Arĝenta ornamaĵo de virino

Liĝu-
geĵunatoj
festvestitaj

Produktejo de ginsengo

Teksto kaj fotoj de WANG ENPU

EN la Nordoriento de Ĉinio estas la malgranda urbo Ji'an. Norde de la urbeto kuŝas Changbai-montaro kaj sudoriente de ĝi fluas Yalurivero. La koreinoj ambaŭborde de la rivero ofte iras al la rivero kun vazo sur sia kapo por ĉerpi akvon. Ĉe la renkontiĝo ili ofte salutas unu alian kaj iam eĉ babilas pri la ĉiutaga vivo, sed en aŭgusto kaj septembro la virinoj de Ji'an ne havas tempon por tion fari. Tiam, ĉerpinte akvon, ili rapidas hejmen por helpi sian edzon rikolti ginsengon.

La ginsengaj ĝardenoj ĉiuj estas sur montoklivoj. Ginsengo-kultivistoj atenteme elfosas rizomojn de ginsengo,



En bazaro de ginsengo

ilin enkorbigas kaj lavas ĉe la rivero, portas klasifikitajn rizomojn hejmen kaj sekigas ilin en ombra loko malantaŭ la domo.

Iu virino diris al mi, ke bonkvalita ginsengo estas granda kaj belforma

kun firma rizomo. Por bone kreskigi ginsengon oni devas atenteme flegi ĝin. Tion dirinte, ŝi invitis min rigardi ginsengidojn kun rizomo dumilimetra en ŝia ĝardeno. Ŝi diris al mi, ke ginsengo kreskas tre malrapide. Ĝi, ĝenerale dirite, maturiĝas post 8 jaroj. Ĝia sana kresko bezonas fekundan kaj malkompaktan teron. Ĝi ŝatas nefortan sunlumadon. Por ĝin protekti oni devas ŝirmi per plasta membrano la ginsengajn bedojn altajn je duono de la homa kresko. Por eviti malvarmon en la nokto oni devas kovri ilin per pajla ŝirmilo. Post 3 jaroj, kiam ĝi floras, oni devas transplanti ĝin en alian lokon.

Ginsengo estas tre tonika kaj refreŝiga. Se gracilaj kaj lacegaj homoj ĉiutage tenas unu aŭ du maldikajn pecojn da ginsenga rizomo en la buŝo, malrapide maĉas kaj fine englutas ilin, tio estas tre utila al la homa revigliĝo. Moderna medicino konigas, ke gin-



Dum sezono sen kamplaboro

sengo havas elementon kontraŭ kancero. De antikve la ĉinoj scias multe da manieroj utiligi ginsengon: trinki infuzaĵon de ĝia pulvoro, prepari eliksiron el ĝi kaj stufi viandon kun ĝi. Oni povas ankaŭ tranĉi ĝin en maldikajn pecojn kaj infuzi ilin por trinki. Antaŭe, kadre de Ĉinio, ginsengo kreskis nur en primitivaj arbaroj en profundaj montoj de la Nordoriento kaj estis tre malfacile trovebla, sekve de tio ĝi estis tre valora. La Ji'an-anoj antaŭ tre longe provis kultivi ĝin, sed sukcese rikoltis ĝin en granda areo nur antaŭ nelonge.


Rigardante la vastan kampon de ginsengo, maljunaj ginsengo-kultivistoj estis kontentaj. Rememorante la pasintaĵon, iu el ili diris: "Antaŭe ja estis multe da reguloj por kolekti sovaĝajn ginsengojn. Antaŭ ol suriri monton, oni devis unue respektplene bruligi incenson por kulturi la prapatrojn kaj en la monto estis malpermesate diri malbonaŭgurajn vortojn. En ĝi oni devis serĉi signojn faritajn de antaŭaj ginsengo-kolektantoj sur arboj kaj atente aŭskulti kanton de bastono-birdo. Ginsengo havas formon de homo aŭ bastono. Estas griza birdo, kiu ŝatas manĝi ginsengajn fruktojn, tial oni nomas ĝin bastono-birdo. Kien ili flugas, tien ili portas ginsengajn semojn. Dank' al



Sekigado de ginsengo




Observado de ginsengo-kreskado



ilia disvastigo, sovaĝaj ginsengoj povas reproduktiĝi." Laŭ la signoj sur arboj aŭ kanto de bastonobirdo la kolektantoj povas trovi ginsengon. Antaŭ ol elfosi la ginsengon, ili devas ĉirkaŭigi ĝin per ruĝa fadeno kun kupra monero, por ke ĝi ne "forkuru". Se ĝi estas tre juna, ili do faras signon sur apuda arbo kaj elterigos ĝin post kelkaj jaroj, tamen ili neniel devas tuŝi ĝian kapon, alie ĝi ĉesos kreski. La sovaĝa ginsengo kreskas ĝis 15 cm post pluraj jarcentoj, dume ĝi asimilas ĉiom da nutro el la grundo, tial en la loko, kie oni estas elteriginta sovaĝan ginsengon, ne eblas kreskado de ginsengo en la venontaj 10-20 jaroj. Eĉ en ginsengaj ĝardenoj, rikoltinte ginsen-


gon, oni devas lasi la grundon ripozi 20-30 jarojn kaj nur post tiu periodo oni povas refoje kulturi ĝin. La kolektantoj de sovaĝa ginsengo devas vivi en profundaj montoj, venki ĉiujn malfacilojn kaj ofte okazas, ke dum pluraj jaroj ili estas trovintaj neniun bonkvalitan ginsengon, sed, trovinte maljunan sovaĝan ginsengon, ili povas vendi ĝin kontraŭ alta prezo kaj eble riĉiĝos pro tio.

La maljunuloj, kiuj kolektis sovaĝajn ginsengojn, daŭre portas nigran malnovfasonan pantalonon. Ili estas alte respektataj de la vilaĝanoj, kiuj ĉiam solenas la datrevenon de ilia naskiĝo, kaj en ĉiuj festotagoj oni kultas la antaŭulojn, kiuj lerte kolek-



tis sovaĝajn ginsengojn siatempe.

Post abunda rikolto de ginsengo Ji'an-anoj celebras feston de ginsengo. Tiam gejunuloj prezentas diversajn ludojn por alilokaj vizitantoj; ludi sur trapezo kaj balancilo. Por ludi sur balancilo paro da junuloj staras ĉe la du ekstremoj de longa tabulo. Ili saltas alterne. Kiam ili saltas pli kaj pli alten, ili povas fari transkapiĝon en la aero kaj post tio fali ĝuste sur la mallarĝan tabulon. Inter la vizitantoj estas kaj eksterlandaj komercistoj kaj alilokaj dungitoj, kiuj helpas la lokanojn kulturi ginsengon kaj revenas hejmen en vintro. Ja tiamaniere Ji'an fariĝis ilia dua hejmloko. ■



Ginsengo kulturata en bedo kun plasta membrano

Enigmoj

*Ĝi havas kornojn, tamen ĝi ne
estas bovo,
ĝi estas malforta, tamen iras
portante domon.
(Molusko)*
*Sur verda kano estas granda
telero,
plenplene kun flavaj skvamoj.
(Planto)*

*Blanka dikulo kovrita de ruĝa
vualo,
dormas en cikatra domo.
(Nukso)*
*Promenas en roĝo, dormas en
lageto,
kuras en rivero, dancas en
maro.
(Likvaĵo)*

(Solvej troveblaj en la sekvan-
ta numero)

Diabolo

Diabolo estas bambua son-dona ludilo, kiu havas du specojn laŭ formo: unu estas unurada, la alia — durada ambaŭflanke de ligna akso. La radoj estas malplenaj, en ĝi estas fajfilo; ĉe la rando de la radoj estas kelkaj truoj. Rekomendindas la ludmaniero: ligi du bambukanojn per ŝnuro, volvi la akson per la ŝnuro, levi kaj svingi la bambukanojn ritme, la diabolo sin turnas rapide kaj rapide, vento venas tra la truoj, kaj la diabolo sonoras. En la pasinteco, antaŭ la Printempa Festo, aŭdeblis ĝiaj sonoj en strateto de Pekino.

Kiel tradicia ludilo, diabolo havas kelkcentjaran

historion en Ĉinio. Antaŭe en Liulichang, antikva kultura strato de Pekino, estis standoj vendantaj diablojn. Venditoj estis lertaj en ludo de diabolo, ili ludis diversmaniere por allogi klientojn. Ili glitigis la diabolon sur bambukano, aŭ ĵetis ĝin en aeron kaj ĝin rekaptis per la ŝnuro, aŭ igis unuradan diabolon turniĝi sur planko kiel turbo, poste reprenis ĝin per la ŝnuro kaj daŭrigis la svingadon.

Kiam kelkaj homoj kune ludas diablojn, ili interŝanĝas ilin kaj daŭre ilin svingas. Akrobatoj evoluigas la ludon en programeron: ili ludas kelkajn diablojn ĉiu per unu ŝnuro, poste ĵetas ilin en aeron kaj rekaptas ilin, samtempe ili faras diversajn movojn, ekz. salto, malantaŭenkliniĝo de kapo, transkapiĝo.

Ludi diabolon povas ekzerci tutan korpon. Svingadi du brakojn favoras pliigon de brakoforto kaj pulmokapacito. Por ekvilibro la ludantoj iras senĉese. Ju pli ili movas siajn brakojn, des pli la diaboloj sonoras. Post ludado ili ŝvitas tutkorpe. ■




YE GUOBIAO:

Pudong – bona loko por investantoj

Pudong situas oriente de Huangpu-rivero. Ŝanhajanoj diris: “Ni preferas havi pecon da loko nur por lito okcidente de la rivero ol ricevi grandan domon en Pudong.” Tio montris, ke antaŭe Pudong estis tre malriĉa kompare kun la urboparto okcidente de la rivero.

Meze de la 90-aj jaroj entreprenistoj de la tuta mondo eniris Pudong. Kio allogis ilin? Kion ili alportis al Pudong?

En 1996, sur mapo eldonita de Usono unuafoje troviĝis neoficiala nomo Pudong.



Financa kaj komerca kvartalo

Foto de Zhang Ming


TIU, kiu en la komenco de la 90-aj jaroj vizitis Pudong de Ŝanhajo, eble ankoraŭ memoras ĝiajn vilaĝojn. Nun, se li staras sur la televida turo “Orienta Perlo” 468 metrojn alta, li povas vidi, ke anstataŭ la vilaĝa pejzaĝo, ĉielskrapantoj kaj movoplenaj stratoj kontrastas kun la malnova urboparto okcidente de Huangpu-rivero de Ŝanhajo.

Jes, dank’ al reformado en la pasintaj jaroj la ekspluata distrikto Pudong multe ŝanĝiĝis.

Pudong, kun areo de 522 kvadrataj kilometroj, situas ĉe la enmariĝo de Yangzi-rivero, en kiun enfluas Huangpu-rivero. Antaŭe trans Huangpu-rivero ne estis ponto nek tunelo, Pudong estis multe postĝinta en ekonomio kaj kulturo kompare kun lokoj okcidente de la rivero. Nun kiel ekspluata distrikto de Ŝanhajo, Pudong rimarkinde progresas.

En la okuloj de antikvaj kaj nuntempaj strategiistoj Yangzi-rivero estas drako antaŭenpuŝanta la ĉinan ekonomion; kaj Ŝanhajo, ĉe la enmariĝo de Yangzi-rivero, estas la draka kapo. Jam en la 20-30-aj jaroj ĝi estis internacia komerca kaj financa centro, la plej granda en Azio. Tamen pro historiaj kialoj la ekonomia potenco de Ŝanhajo malfortiĝis. En la 80-aj jaroj, kompare kun la sudaj ĉemaraj urboj, kia Shenzhen (Ŝenĝen), kiuj la unuaj komencis reformadon, la progreso de Ŝanhajo estis malpli rapida.

Kiel do profundigi la reformadon en Ŝanhajo? En la 90-aj jaroj,





Pudong hodiaŭ Foto de Zhang Ming


En laborejo de allanda entrepreno en Ĉinio

Foto de Chen Fei





Pudong hieraŭ Foto de Zhang Ming



Yangpu-ponto super
Huangpu-rivero

Foto de Ren Long



En la Ŝanhaja Borso

Foto de Zhang Ming

kiam efikas la pordmalfermo de sudo al nordo, de ĉemaraj lokoj al la landinterno, fariĝis pli grava la akcelo de ekspluatado kaj pordmalfermo de Ŝanhajo. Ĉar al ĝia malnova urboparto mankis sufiĉe da spaco, oni elektis Pudong kiel ekspluatadon distrikton.

Kun superaj ekonomia bazo, kapabluloj, tekniko kaj administrado de la malnova urboparto kaj vasta spaco de Pudong, Ŝanhajo sin malfermis al la tuta mondo. En la pasintaj 8 jaroj Ŝanhajo enkondukis 16 000 programojn investitajn de aliaj landoj, subskribis interkonsentojn por utiligi alilandajn kapitalojn de 50 miliardoj da usonaj dolaroj kaj efike plibonigis la industrian strukturon.

Utiligante siajn specialajn riĉfontojn kaj favorajn politikojn, la frue fonditaj ekonomiaj ekspluatad distriktoj en la ĉemaraj malfermitaj urboj, inkl. de Ŝanhajo, enkondukis alilandajn kapitalojn, avangardajn teknikojn kaj administrajn

spertojn kaj plenumis la plibonigon de teknikoj kaj industria strukturo. Tiamaniere formiĝis en Ĉinio malfermitaj ekonomiaj distriktoj de diversaj tipoj. Surbaze de tiuj spertoj oni lanĉis pli grandskalan sintezan ekspluatadon kaj pordmalfermon en Pudong, por ke ĝi antaŭenpuŝu la ekonomian disvolviĝon en la tuta baseno de Yangzi-rivero.

La ekspluata distrikto Pudong konsistas el kvartaloj de financo kaj komerco, poreksporta prilaboro, doganlibero, altteknologio, moderna-agrikultura ekspluatado, industrio, kulturo kaj turismo, kaj moderna vivo.

Starante sur la financa strato de Waitan kaj rigardante orienten al Pudong trans Huangpu-rivero, oni antaŭ ĉio povas vidi la kvartalon de financo kaj komerco nomatan Lujiazui. En Ĉinio ĝi estas la ununura kvartalo nomata per financo kaj komerco. En tiu "ora triangulo" kun areo de 28 kvadrataj

kilometroj, koncentriĝas pli kaj pli multaj esencaj merkatoj, ĉinaj kaj alilandaj financaj institucioj, transnaciaj korporacioj kaj staboj de grandaj ĉinaj entreprenoj. La kvartalo kune kun Waitan formas la komercan centron, plej aktivan en Ŝanhajo.

Aŭguston de 1995, la Ŝanhaja Filio de Fuji-banko de Japanio kiel la unua alilanda banko ekfunkciis en Pudong. La Administra Komitato de Pudong-distrikto pro tio donacis al ĝi skulptitan lignan ĉevalon, signifantan ke "unu ĉevalo sturmas, dek aliaj sekvas." Sekve de tio, bankoj de Tajlando, Usono, Japanio, Britio ktp. unu post alia starigis en Pudong sian filion. Nun pli ol 50 alilandaj bankoj, valorpaperaj kaj asekuraj institucioj enloĝiĝis en Pudong, 9 el la alilandaj bankoj ricevis la licencon pri operaciaj rilatoj al la ĉina mono. Tio signifas, ke la malfermo de la ĉina financo faris epokfaran paŝon.

La kvartalo de poreksporta

Vizito de usonaj parlamentanoj

Foto de Xu Yigen





Rekomendo de produktajo al ĉinaj klientoj

Foto de Zhang Ming

prilaboro nomata "Ora ponto" celas enkonduki kaj asimili la unuagradajn industriajn teknikojn de la mondo por akceli renoviĝon de la ĉina industrio. Nun la kvartalo jam enkondukis 300 modernajn industriajn programojn el 60 landoj kaj regionoj. Tie fundamente formiĝis moderna strukturo kun industrioj de mikroelektroniko, moderna telekomunikado, novgeneraciaj familiaj elektraj aparatoj, aŭtopecoj, integriĝo de lumado kaj elektro, biologiaj medikamentoj ktp.

La doganlibera kvartalo nomata Waigaoqiao kun areo de 6.4 kvadrataj kilometroj estas la unua granda liber-komerca kvartalo. Ĝi celas disvolvi komercojn de prilaboro, servo kaj perado. En la pasintaj monatoj, spite al influo de la financa krizo en Azio, mondfamaj kompanioj, kiaj IBM de Usono, Mitsubishi de Japanio, Hyundai de Koreio, Philips de Nederlando, unu post alia eniris tien por starigi komercan kompanion.

La kvartalo de altteknologio nomata Zhangjiang fondis la Ŝanhajan Biologi-medikamentan Sciencan Bazon de Ĉinio, kiu allogis serion da ĉinaj kaj alilandaj biologi-medikamentaj institucioj. Tie es-

pereble aperos la "medikamenta valo" de Ĉinio.

En ekspluatado de Pudong oni unuapaze disvolvis la konstruadon de bazaj instalaĵoj, altteknologio, financo kaj komerco, laŭeble utiligis la merkatojn, kapitalojn, riĉfontojn en- kaj eksterlandajn. Laŭ statistiko, la enlanda produktov valoro de Pudong kreskis de 6 miliardoj da juanoj en 1990 al 60.8 miliardoj da juanoj en 1997, t.e. de 8.1% al 18% de tiu de Ŝanhajo. La rapidega progreso de Pudong akcelis la ekonomion ne nur de Ŝanhajo, sed ankaŭ de la tuta Ĉinio.

Samtempe kun la konstruado de trafikaj, telekomunikaj kaj energiaj instalaĵoj, la Administra Komitato de Pudong-distrikto klopodas fari sufiĉe bonan servon al la investantoj, laŭ la principo "simpleco, unueco kaj efiko". Ekz., la ekzameno kaj aprobo de investa programo uzas tempon sesone kiom

antaŭe. Plie, aplikado de 70 leĝoj kaj statutoj, kiuj celas defendi la justan konkurencon kaj la rajtojn de la investantoj, plifortigis ilian fidon. Nun 100 el la 500 mondfamaj transnaciaj kompanioj investis 150 programojn en Pudong. Tie la bona investa medio kaj kompare pli alta profito de investo instigis la kompaniojn plimultiigi investan kapitalon. Ekz., la Kompanio Siemens de Germanio sinsekve investis 4 entreprenojn en Pudong.

La Ŝanhaja Elektronika Limigita Kompanio Hitachi investita kune de Ĉinio kaj Japanio fariĝis modelo en Pudong. Ĉiuj japanaj investantoj, kiuj tie faris esploradon, vizitis la kompanion. Tio ege okupis la japanan vicĉefdirektoron, kiu en la pasintaj jaroj akceptis 200 japanajn esplorajn grupojn. Li diris al siaj samlandanoj: "Sian sukceson en Ŝanhajo la kompanio Hitachi ŝuldas al la bona investa medio, alta kvalito de laborantoj kaj granda merkato."

Pudong jam fariĝis bona loko por alilandaj investantoj. Laŭ statistiko, ĝis la fino de julio 1998, entreprenistoj de pli ol 60 landoj kaj regionoj investis en Pudong 5 250 programojn kun 25.8 miliardoj da


usonaj dolaroj kaj 300 mil laborantoj. La "aliland-kapitala ekonomio" en Pudong eniris sian maturiĝan etapon de profunda ekspluatado kaj ĉiuflanka disvolviĝo.

Fakte, Pudong estas neoficiala nomo uzata de la ŝanhajanoj, kiu ĝenerale ne troviĝas sur mapo. Tamen sur la mondmapo, publikigita de la Mapa Eldonejo Atlas de Usono en 1996, unufoje troviĝas la nomo Pudong. Tio signifas, ke la rolo kaj renomo de Pudong estas vaste konataj de la mondo. ■



Alilanda entreprenisto konsultanta ĉinajn doganistojn

Foto de Chen Fei



La Granda Kanjono de
Yarlung Zangbo
Foto de Du Zequan

Nam Co, sankta lago por tibetanoj


Foto de Du Zequan



Sovaĝaj azenoj sur altebenaĵo en norda Tibeto

Foto de Du Zequan





Vojaĝo en Tibeto

de HU YUN

Tibeto — loko mistera kaj alloga.

LHASA — SANKTA URBO SUR ALTEBENAĴO

Lhasa 3 650 m super la marnivelo estas la plej alta urbo de la mondo. Super ĝi bluas la ĉielo kaj brilas la suno, pro tio Lhasa portas ankaŭ la nomon Sunluma Urbo.

Lhasa havas longan historion. Al ĝia centro etendiĝas asfaltita ŝoseo, kiu komenciĝas de la aerodromo Gongga. Navetaj trafikilo-fluoj sur la ŝoseo kaj arbore starantaj altaj konstruaĵoj ambaŭflanke de ĝi elspiras modernecon. Tamen, por la tibetanoj Lhasa estas eterne sankta urbo, en kiu imponas Potala-palaco.

Post unuigo de la tibetaj triboj en la sepa jc., Sunzamkampo, estro de Tubo-regno, prenis Lhasa kiel la ĉefurbon kaj konstruigis sur Hongshan-monto Potala-palaco el la halo, kastelo kaj ĝardeno por edzigi sin al princino Wencheng el la imperiestra



Trumpetado kiel lamaoj

Foto de Yan Changqing



Ĉevala vetkurado Foto de Liu Wenmin

familio de Tang-dinastio. Kaj nun, en la Halo de Ŝakjamunio estas kultataj la statuoj de regnestro Sunzamkampo kaj princino Wencheng.

Potala-palaco, simbolo de Tibeto, signifas ŝipon, kiun Avalokitesvaro pilotas por savi popoloamasojn el la maro. Ĝi estas giganta labirinto. Sennombraj budhostatuoj kaj trezoroj en ĝi kaj la konstruaĵoj enkorpiĝas la saĝon de la tibetanoj kaj reprezentas la plej altan nivelon de la tibeta kulturo. Pro tio, Potala-palaco estas honorita kiel sanktejo de la tibetaj lamaoj kaj trezoro de la ĉinaj kulturo kaj arto.

Jokhang-templo troviĝas en la sankta urbo Lhasa. Legendo diras, ke ĝia sidejo estis determinita de princino Wencheng laŭ la teorio de kvin elementoj kaj energioj *jin* kaj *jang*. En la templo kun la arkitektura stilo de Ĉinio, Nepalo kaj Hindio konserviĝas granda kvan-



Memorajoj plaĉaj al turistoj

Foto de Yan Changqing

to da historiaj objektoj, el kiuj la plej fama estas ora statuo de Ŝakjamunio alportita de princino Wencheng.

Ĉiumatene, antaŭ Jokhang-templo kolektiĝas multaj pilgrimantoj, kiuj parkere legas la sesliteran moton, kalkulante rozarion per fingroj de unu mano kaj turnante preĝradon per la alia, aŭ foje-foje rampas surtere. Tiam, antaŭ la templo regas densa religia etoso.

Kaj samtempe, ĉirkaŭ la templo funkcias butikoj de braceletoj, kolieroj, tibetstilaj tranĉiloj, parfumoj kaj aliaj vivnecesaĵoj. Multaj turistoj marĉandas en diversaj lingvoj kun komercistoj. Turistoj kaj pilgrimantoj kune formas seninterrompan homfluan. Do, Barkhor-strato ja estas konata kiel la plej movoplana en Lhasa.

GRANDA KANJONO DE YARLUNG ZANGBO

Yarlung Zangbo, patrino de Tibeto, fluas preter Namjagbarwa-montpinto, kaj formiĝis la Granda Kanjono de Yarlung Zangbo, plej granda en la mondo, kun averaĝa profundo de kvin mil metroj. Kiel giganta drako, la rivero Yarlung Zangbo torentas en la kanjono kun tondra bruego. Namjagbarwa-montpinto, kovrita de neĝo kaj ĉirkaŭita de nuboj, staras tie kvazaŭ bela feo. Sur ĝia supro pendas glaciaj kolonoj kaj sub ĝi verdas arbara maro. En Tibeto estas 50 tiaj montpintoj, inkl. de Qomolangma, la plej alta en la mondo.

La regiono Nyingchi ĉe la kanjono de Yarlung Zangbo portas ankaŭ la nomojn "Regiono sude de Yangzi-rivero en Tibeto" kaj "Lando riĉa je greno" pro siaj abunda pluvo, fekunda tero kaj prospera arbaro. Tamen, la regiono Medo estas preskaŭ izolita. Nur en somero, kiam degelas neĝo, ĝi kontaktiĝas kun la ekstera mondo. En la regiono, kie etendiĝas la kanjono, interkruciĝas danĝeraj vojoj, glaciaj riveroj, apikaj krutaĵoj kaj torentaj riveroj. Iuj ĝiaj lokoj restas ankoraŭ dezertaj. En 1998 la kanjono denove fariĝis fokuso por vojaĝantoj pro tio, ke ĉinaj sciencistoj faris esploradon pri ĝi.



Alilandaj turistoj en la festivalo de ĉevala vetkuro

Foto de Yang Xiuyun

ĈARMA STEPO EN NORDA TIBETO

La altebenaĵo en norda Tibeto konsistigas 2/3 de la totala areo de Tibeto. Tie brilas la suno, lazuras la ĉielo, fekundas la herbejoj kaj majestas la montoj kovritaj de neĝo. En la okuloj de la tibetanoj estas sanktaj la tieaj montoj kaj lagoj.



Preĝo de Pelajuloj

Foto de Liu Wenmin

ankaŭ kantojn kaj dancojn. Kaj samtempe okazas ankaŭ grandioza foiro.

EN LA POLUSA REGIONO ALI

Ali portas ankaŭ la nomon "Tegmento sur la tegmento de la mondo". Ĝia vasta altebenaĵo skuas la animon de la homoj kaj la mistera ruino de antikva urbo konigas ĝian prosperan pasintecon. Insuloj de birdoj, freskoj en kaverndomoj kaj lagoj ĉiuj havas sian propran ĉarmon.

En Ali la plej mistera kaj la plej alloga estas la ruino de la regno Guge. En la 17-a jc., la pli-ol-700-jara regno Guge malaperis kun sia longhistoria kaj prospera civilizacio, kiun pruvas la grandioza ruino. Arkeologoj esperas trovi sur la ruino atestaĵon de la historio. Kaj kion pensas turistoj tie? Mi pensas, ke ankaŭ ili volas esti la unuaj solvantoj de la enigmo de Guge. ■


Nam Co, unu el la kvar sanktaj lagoj de Tibeto, aspektas kiel gemo sur la altebenaĵo en norda Tibeto. Per siaj ĉarmaj pejzaĝoj la lago ravas ĉiujn vojaĝantojn. Borde de ĝi abundas herboj tutjare kaj poefagoj, ĉamoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj frekventas la lokon.

Norda Tibeto estas paradizo de sovaĝaj bestoj. Nigraj kornoj de tibetaj virgazeloj estas longaj kaj maldikaj kiel vipo. Kiam galopas sovaĝaj azenoj per siaj maldikaj kaj lertaj gamboj, aŭdeblas bruego kaj videblas nubo da polvo en la aero.

Aŭgusto estas ora monato sur la stepo en norda Tibeto. Dekoj da miloj da paŝtistoj kolektiĝas tie el ĉirkaŭaj lokoj por celebri sian plej solenan festivalon de ĉevala vetkuro. Intertempe oni ĝuas ne nur konkurson de pafado sur ĉevalo kaj prezentadon de ĉevalrajdado, sed

Tibeta teatro

Foro de Liu Wenmin





Preparado de teo kun lakto

Sur la vasta stepo de Xilin Gol de Interna Mongolio, multaj familioj de paŝtistoj, kia tiu de Badama, adiaŭis nomadisman kaj disvolvis bredadon kaj paŝtadon sur la familia paŝtejo. Post pli-ol-dek-jara penado ili akiris riĉan rikolton.

Nun ĉiu familio havas sian fiksan loĝejon. Sur la stepo bonorde staras tegolitaj brikdomoj, sundomoj kaj kvadrataj kortoj kun loĝdomoj. Antaŭ la do-

moj estas kamionetoj kaj motorcikloj kaj ne plu videblas ĉevalgiloj kaj ĉevalĉaroj. Somere herboj prosperas kaj akvo abundas. Badama paŝtas ĉ. 1 500 brutojn sur sia 133-hektara paŝtejo farmita. Nur tiam li vivas en jurto kun modernaj vivinstalaĵoj. Vent-energia generatoro estas uzata por doni elektron. Vespere la familianoj sidas antaŭ la televidilo kaj ĝuas la novan vivon.

Familio



En jurto




Ŝafaro sur stepo

sur stepo

Teksto kaj fotoj de ZHAO XI



"Jen, ni atingas la hejmon!"



Avino kaj nepino



Translokiĝo al alia paŝtejo

Maŭzoleo de Yue-reĝo

de YI YUN

SEN hazarda eltrovo en la ĉina historio ne estus noto pri la triangula maŭzoleo. Komence de 1998, post arkeologia prifosado dum unu jaro kaj duono oni malkovris la maŭzoleon de Yue-reĝo, konstruitan antaŭ 2 500 jaroj. La maŭzoleo altiras publikan atenton per sia grandiozeco kaj originala formo.

La maŭzoleo situas ĉe la piedo de Yinshan-monto, Shaoxing, Zhejiang-provinco. Proksime de ĝi estas vasta te-arbaro kaj fore de ĝi ondas verdaj montoj kovritaj de densaj nuboj.

La maŭzoleo, ĉirkaŭita de fosaĵoj, areoj pli ol 100 000 kvadratajn metrojn kaj la tombofoso profundas 15 metrojn. Arkeologoj konigis, ke antikvece, ĉe konstruado de la maŭzoleo, por faciligi en- kaj eliradon ĉe montodeklivo la laborantoj faris vojon rekte al la fundo de la maŭzoleo. Mi trovis, ke la tomba vojo estas tre larĝa, ke ĝi ebligas paralelan iradon al pli ol dek homoj. Mi iris enen ĉ. 50 m. kaj atingis la maŭzoleon halon ekskluzive el gigantaj kvadrataj traboj el ligno. Ankaŭ la planko de la halo estis konstruita el tiaj traboj sternitaj sudnorden, kaj la muroj el tiaj traboj aranĝitaj en A-formo, tial la interno de la halo havas triangulan formon. Por garantii la strukturan stabilecon en la halo estas multaj vertikale metitaj traboj. La fundo kaj muroj konsistas el traboj, ĉiu kun sekco de 60-80 kvadrataj centimetroj. Ŝajnas al mi, ke tie estas



Tomboj fositaj antaŭ 2 500 jaroj

entute centoj da traboj. Fakuloj diris al mi, ke por fari kvadratajn trabojn kun sekco de 80 kvadrataj centimetroj oni bezonas lignon kun diametro de almenaŭ unu metro. El tio oni povas imagi, kiom da jaroj kaj kiom da homoj oni bezonis por haki, segi kaj transporti tiel grandnombrajn arbojn. Tiuj lignaĵoj estas ebenaj kaj superbe poluritaj. Sciu, ke ĉio ĉi tio estis farita antaŭ 2 500 jaroj. Per kiaj instrumentoj oni faris tion en tiuj jaroj? La enigmo vekis ĉe ni grandan scivolem-

on. La maŭzolea halo konsistas el tri grandaj ĉambroj: la antaŭa, meza kaj posta, kiuj nun estas bone konservitaj. Arkeologoj konigis, ke dum konstruado antaŭ ĉio oni sternis tavolon da lignokarboj 1.6 m dikan sur la fundo de la tombo-

foso 46 m longa kaj 20 m larĝa. Post finkonstruiĝo de la halo oni tegis ĝin per 140 tavoloj da arboŝeloj kaj ekster la arboŝeloj oni metis tavolon da lignokarboj dikan je ĉ. unu metro. Post tio oni metis bonkvalitan koton en la tombofoston tavolon post tavolo kaj fine konstruis gigantan teramason sur la tombo. Jen per tiuj sciencaj metodoj oni efike preventis difektiĝon de la tombo kaj ŝirmis ĝin kontraŭ akvo.

Estas miriga la ĉerko el soltrunko. Ĝi, en la meza ĉambro, estis farita el giganta duonigita ligno kun kavo. La ĉerko longas 6.1 m, altas 1.15 m kaj dikas 24 cm. Ĉe la elteriĝo ankoraŭ brilis ĝia nigra lako. Fakuloj opiniis, ke la arbo kreskis pli ol mil jarojn, tio signifas, ke ĝi elkreskis jam antaŭ 3 500

jaroj. Tiel granda ĉerko farita de likate estas unika en la ĉina historio laŭ la arkeologiaj literaturoj. En la ĉerko ne estas restaĵoj de la mortinto. Kial? Ĉu pro ŝtelado? Ĉu ĝi estis malplena origine por ne ebligi ŝtelon? Pri tio ĝis hodiaŭ oni ankoraŭ ne havas difinitan konkludon.

Pro la serioza ŝtelado siatempe en la maŭzoleo oni trovis nur jadaĵojn, ŝtonajn laborilojn, bronzaĵojn, lakaĵojn kaj aliajn, entute pli ol 40 altvalorajn historiajn objektojn, el kiuj estas jada spado kun delikataj vejnoj sur si. Ĝi, kredeble, estis portata de la mastro de la maŭzoleo. Tamen kiu estis ĝia mastro? Arkeologoj konstatis, ke tio estas tombo de Yun Chang, suvereno de Yue-regno. Koncerne Yue-regnon (ĉ. 514-306 a.K.), multaj ĉinoj scias anekdoton de Gou Jian, filo de Yun Chang. En la periodo Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) okazis milito inter Wu-regno kaj Yue-regno, en kiu Yue estis venkita de Wu kaj Gou Jian, reĝo de Yue, estis kaptita de Wu-regnaj soldatoj. Gou Jian ŝajnis sin lojala al Wu, donacis bele-

gan knabinon Xishi al Wu-reĝo kaj pro tio per ruzo ricevis konfidon de Wu-reĝo, kiu do permesis al Gou Jian reveni al sia regno. Reveninte sian hejmlokon, Gou Jian decidis venĝi sin kontraŭ Wu. Por ne forgesi la malgloron li dormis sur pajla kuseno kaj pendigis galon antaŭ la kuseno. Ĉiumatene post vekigo antaŭ ĉio li gustumis la galon (tio signifas preparadon por sinvenĝo). Pro sia peniga kaj longdaŭra preparado finfine li pereigis Wu-regnon kaj restaŭris sian patrolandon.


Dum prifosado de la maŭzoleo estis trovitaj sep truoj, tra kiuj oni faris tomboŝteladon en la antikveco. Okcidente de la maŭzoleo oni trovis grandan truon, tie du traboj, ĉiu kun diametro de 0.8 m, estis rompita kaj de tie la ŝtelistoj eniris en la tombon. Laŭ kalkulo, ĉiu trabo pezis pli ol unu tunon. En la ŝtelejo oni trovis ankaŭ ŝtonan adzon. Por ŝteli en la loko profunda je pli ol 10 m oni rompis tiel grandajn trabojn en la tempo, kiam la produktaj fortoj estis tre malgrandaj, tio jam superis individuajn fortojn, tial oni supozis, ke la ŝtelado estis organizita de la loka



Jada paperpremiilo

registro.

Arkeologoj faris supozon pri la tomboŝtelado: En 306 a.K. Chu-regno pereigis Yue-regnon. La venkintoj timis reaperon de la historio de Gou Jian kaj venĝon far la popolo de Yue kaj decidis detruigi la tombon de Yue-reĝo. La arkeologoj opiniis, ke pro koloseco de la entombigitaj objektoj, la ŝtelistoj ne povis elpreni ilin tra la truo kun diametro de nur 0.8 m, tial ili decidis rompi la alian trabon por facile formovi la objektojn el la tombo. Aliaj arkeologoj opiniis, ke eble la ŝtelado ne estis nur unufoja, ĉar post sia unuigo de Ĉinio, por ne ebligi al Yue-popolo venĝi sin kontraŭ la regantoj, ankaŭ Qin-dinastio eble organizis plurfojan ŝteladon. ■



Ĉerko el soltrunko

Paco-kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) por konsultigo pri internacia afero

Servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj:

Importo kaj eksporto de komercaĵoj;

Laboro en Ĉinio; internacia geedziĝo.

Adr.: Direktoro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230001 He-fei, Ĉinio.

Tel/Fax: +86-551-2632545; -4484606

Hejmpaĝo: <http://www.online.ah.cn/pac/>

Ret-poŝto: cnhflib@public.hf.ah.cn

Loĝkutimoj de ĉinoj

Mi volas scii pri ĉinaj loĝkutimoj en pasinteco kaj nuntempo.

KALJU LILLEPUU (Estonio)

de PANG NAIYING

ĈINAJ loĝkutimoj estas malsamaj pro diferenco de etnoj, regionoj, naturaj kaj sociaj kondiĉoj.

La kvadrata korto reprezentas loĝejon de la malnova Pekino, kiu konsistas el domoj en la kvar flankoj kaj korto en la mezo. Ĝenerale, en la ĉefa domo, kiu rigardas al sudo, loĝas gepatroj, en la orientaj flankaj domoj — la unua filo, lia edzino kaj iliaj infanoj. La okcidentaj flankaj domoj malgravas kompare kun la orientaj, dum la suda servas kiel salono aŭ legoĉambro. Pasinteco, en unu kvadrata korto loĝis nur unu familio. Sekve de kreskado de loĝantaro, en tia korto loĝis kelkaj kaj eĉ dekelkaj familioj. Post la 80-aj jaroj plejparto de la pekinanoj enloĝiĝis en etaĝdomoj. Kaj la kvadrataj kortoj bone konservitaj fariĝis valoraj “historiaj restaĵoj”.

De antikve la lokanoj sur la Leŭsa Altebenaĵo emas loĝi en kaverndomoj. Pro manko de ligno kaj ŝtono kaj dank’ al seka klimato kaj tenaca tero, la lokanoj konstruas sur leŭsa krutaĵo kaverndomojn kun fenestroj kaj pordo. Tia kaverndomo nedifekteblas eĉ dum jarcentoj. Se la fasado iom defalas, oni forigas ĝin, pliprofundigas la kaverndomon kaj konstruas novan fasadon. La kaverndomoj unuj super aliaj, varmaj en vintro kaj malvarmetaj en somero, nek okupas agroj nek damaĝas la tersurfacon.

Tiuj, kiuj loĝas en kaverndomo, dormas sur terlito konstruita el adoboj kaj interkomunikigita kun kameno. Kiam oni preparas

manĝaĵon, fumo pasas tra la terlito kaj varmigas ĝin. La varma terlito estas tre komforta kaj utilas al sano. Tia terlito estas vaste uzata en la kamparo de norda Ĉinio. Sur ĝi virinoj kudras, infanoj faras hejmtaskon kaj la tuta familio prenas manĝon. Por akcepti gastojn, la mastro petas ilin sidiĝi sur ĝi.



Loĝdomoj kun kvadrata korto en la mezo

Antaŭ la Printempa Festo virinoj kun krucitaj kruroj sidas sur la varma terlito kaj faras papertondaĵojn, gaje babilante. Ili pentras ruĝajn kaj verdajn florojn kaj birdojn kun favoraj aŭspicioj por ornami la murojn ĉe la terlito. Tiam en la kaverndomo regas gaja atmosfero.

En norda Ĉinio oni konstruas loĝdomojn plejparte el brikoj kaj ligno, kaj en suda Ĉinio, el lignaj tabuloj, ŝtonplatoj aŭ bambuoj. En tropika pluvbaro de Yunnan, sudokcidenta Ĉinio, tajoj kutime loĝas en bambua etaĝdomo kun granda A-forma tegmento. En la etaĝdomo estas bambuaj planko, ŝtuparo, muroj, fenestroj, tabloj, seĝoj kaj litoj.

Domkonstruado estas grava afero por tajoj. Laŭ iliaj kutimoj, kiam unu familio konstruas etaĝdomon, ĉiuj aliaj vilaĝanoj

helpas ĝin. La 8 ĉefaj kolonoj estas rigardataj kiel plej grava parto de la bambua etaĝdomo. Pro tio, kiam la mastroj transportas ilin el monto, la vilaĝanoj, kaj junaj kaj maljunaj, venas verŝi akvon por benado. La kolonoj estas dividitaj en virajn kaj virinajn. Starigate, la viraj portas veston de viro kaj la virinaj — tiun de virino, ĉar oni opinias, ke tio garantias prosperon de la familio.

Paŝtistoj en Interna Mongolio, Xinjiang kaj Qinghai loĝas ĉefe en tendoj faritaj el bovharoj aŭ ŝaf-felto. En Interna Mongolio, antaŭ ol starigi tendon, oni petas lamaajn reciti sutrojn. Stariginte ĝin, ili kultas dion. Antaŭ la niĉo de dio, eĉ gastoj ne rajtas sidi.

En ĉiuj vilaĝoj de hujoj en nordokcidenta Ĉinio troviĝas moskeo kaj sur la tegmento de ĉiuj domoj estas malgranda ĉambro destinita por reciti sutrojn. Tie maljunuloj faras preĝon, neniam ĝenate.

Sur la Suda Ĉina Maro iuj fiŝistoj prenis fiŝboaton kiel hejmon. Tage ili kaptis fiŝojn sur la maro kaj nokte dormis en la boato. Kiam ili ne kaptis fiŝojn, ili konstruis ĉe marbordo domojn en formo de boato.

En primitivaj arbaroj de nordorienta Ĉinio vivis oroĉenoj, kiuj loĝis en malgrandaj lignaj domoj konstruitaj sur arboj por eviti atakon de sovaĝaj bestoj. Ili neniam ŝlisis la pordon, por ke malsataj ĉasistoj eventuale prenu manĝaĵon en ĝi, aŭ por ke lacaj pasantoj dormu en ĝi...

En Ĉinio ekzistas sennombraj loĝkutimoj, kiuj havas saman kulturen fonton, kvankam ege dife-

rencaj. Ekz., de antikve oni opinias, ke la loko, kie sidos la domo, estas ege grava, ĉar tio destinas prosperon kaj malprosperon de la familio, feliĉon kaj malfeliĉon de la posteuloj. Pro tio, por konstrui domojn ĉinoj kutimas peti diveniston pririgardi medion por la dombazo. La teorio pri medio pledas por kunfandiĝo de la homoj kaj la naturo. Laŭ ĝi, estas pli bone, ke la domo staras ĉe akvo kaj monto. Laŭdire, tia medio utilas al multiĝo de familianoj kaj riĉiĝo de la familio.

Tradicie ĉinoj ŝatas kune loĝi laŭ familia nomo aŭ klano. Pro tio aperis vilaĝoj kun jenaj nomoj: “Zhangjia Zhuang (vilaĝo de familioj Zhang)”, “Lijia Tuan (vilaĝo de familioj Li)”, “Majia Bu (vilaĝo de familioj Ma)” k.a. En grandaj vilaĝoj, konsistantaj el miloj da familioj, estas nur kelkaj familiaj nomoj. Laŭ antikva religia etiketo, antaŭ ol konstrui domojn, oni starigas templon por la prapatroj. Tio helpas al la posteuloj memorsian originon. Post pluraj generacioj kaj migrado en malproksimo oni ankoraŭ povas trovi sian hejmlokon kaj rekoni siajn prapatrojn. Eĉ dum migrado pro milita ĥaoso la tuta klano transloĝiĝas, ne forgesante kunporti la memortabuleton de la prapatroj. Pasintece loĝantoj en norda Ĉinio plurfoje transloĝiĝis al suda Ĉinio. Pro tio oni nomis ilin enmigrintaj gastoj. Transloĝiĝinte de centra Ĉinio al Guangdong, Fujian k.a. la grandaj riĉaj familioj konstruis tie rondan aŭ kvadratan domaron aŭ terajn etaĝdomojn, kun prapatra halo en la centro, en kiu oni diskutis pri gravaj aferoj de la klano aŭ okazigis geedziĝan aŭ funebran ceremonion.

La domaro kun fortika strukturo povas rezisti kontraŭ rabistoj. Aliaj loĝdomoj havas similajn trajtojn. Anshun, Guizhou-provinco, servas kiel grava pasejo sur la vojo de centraj regionoj al la sudokcidenta landlimo de Ĉinio. En Mingdinastio (1368-1644) la kortego



Bambuaj etaĝdomoj de tajoj

sendis al la loko pli ol 200 mil garnizonantojn. Ili starigis tie vilaĝojn oportunajn kaj al terkulturo kaj al batalo. Ĉiuj tiuj vilaĝoj estis ĉirkaŭigitaj per ŝtonaj muroj kun gardoturoj, kreneloj kaj fuortoj. La antikva sistemo de hereda militservo estis abolita antaŭlonge. En la loko regas paco kaj la menciitaj fortikaĵoj ne plu servas. Tamen domoj de la garnizonantoj loĝas ankoraŭ en tiuj pli ol 300 vilaĝoj kaj sin okupas pri terkulturo. En festaj tagoj ili ŝatas porti maskon kaj prezenti teatrojn pri milito.

En iuj foraj montregionoj tre malmultaj homoj ankoraŭ konservas siajn loĝkutimojn. Ekz., en okcidenta Yunnan-provinco, iuj lokanoj kiel siaj prapatroj ankoraŭ loĝas en kaverno. Kvankam la registaro konstruigis por ili domojn ekster la kaverno, tamen ili preferas loĝi en ĝi kun ŝtonaj ŝranko, tablo, seĝo, lito, forno, grenejo kaj eĉ trogo por porkoj, kiuj ĉiuj estas ĉizitaj sur la rokmuroj kaj ligitaj kun la kaverno. En la sudorienta parto de la menciita provinco troviĝas kavernaj vilaĝoj, kies anoj konstruis en kaverno domojn sen tegmento. Ĝis hodiaŭ la lokanoj ankoraŭ ne kutimas ŝlosi la pordon.

La loĝkutimoj de la nunaj ĉinoj estas multe pli simplaj. Antaŭe,

kampanoj loĝis plejparte en unu-etaĝa domo kaj nun multaj el ili enloĝiĝis en luksaj domoj plejparte kun 2-3 etaĝoj. La malsupra etaĝo servas kiel salono kaj tenejo, kaj la supra — dormoĉambroj. Ĝenerale, apud la domoj estas kortoj, kie kampanoj kulturas florojn, fruktarbojn kaj legomojn.

Nuntempe, pli kaj pli multaj urbanoj enloĝiĝis en etaĝdomoj. Sekve de tio, oni turnis la atenton al dekoracio de la ĉambroj. Iuj familioj malavare elspezis sian ŝparmonon por dekoracii la ĉambrojn. Kaheli kuirejon kaj necesejon estas simpla dekoracio. Ĝenerale, 3-membra familio aranĝas sian 2-ĉambran apartamenton kiel jene: la ĉambro pli granda servas kaj kiel salono kaj kiel dormoĉambro de la infano, la malgranda — dormoĉambro de la gepatroj kaj la vestiblo — manĝejo. Oni pli kaj pli alte taksas la rolon de salono. Eĉ se la apartamento estas malgranda, oni preferas servigi unu ĉambron kiel salono. Por kontentigi tian bezonon, konstruaj kompanioj ellaboris projekton de novtipa apartamento kun granda salono kaj malgrandaj dormoĉambroj. Kompreneble, se la kondiĉoj permesas, oni certe uzas unu ĉambron kiel legoĉambron kaj kulturas florojn en ĉambroj kaj sur balkono. ■

Familio de orfoj

de FU XU

HEIDOU, 7-jara, kun cikaĵoj sur la vizaĝo, altas kiel knabo 3-4-jara. Lia patrino estis kondamnita al mallibereco pro mortigo de lia patro en familia konflikto. Tiam li estis malpli-ol-4-jara kaj akceptita de maljuna samvilaĝano. La iom stranga maljunulo vivtenis lin, instruis lin paŝti ŝafojn kaj fari aliajn simplajn laborojn kaj en malbona humuro batis lin.

Kompare kun Heidou, la situacio de Wenlong kaj lia fratino Wenying estis iom pli bona. Antaŭe ili vivis feliĉe kun amo de la gepatroj kaj bonaj vivkondiĉoj. Tamen la patro estis ekzekutita pro murdo kaj la patrino falis en gravan malsanon. Per vendo de la familia havaĵo la gefratoj sin vivtenis, ĝis nenio troviĝis en la domo.

Kiam la gepatroj estis enkarcerigitaj pro krimoj, Wang Long kaj lia fratino Wang Zhen forlasis la kamparon kaj vagis en stacidomo aŭ sur strato de urbo. Finfine ili fariĝis ŝtelistoj.

Zhang Shuqin, ĵurnala redaktoro, ege maltrankviliĝis, kiam ŝi kontaktiĝis kun tiuj infanoj. Laŭ ŝia opinio, gepatroj krimis, tamen senkulpaj estas la infanoj. Origine ili povus esti dorlotataj de la gepatroj, viziti lernejon, ĝui bongustaĵojn kaj belaĵojn, samkiel siaj samaĝuloj. Tamen la malfeliĉa okazaĵo ne nur forrabis de ili la bazajn vivrimedojn, sed ankaŭ vundis al ili la koron, restigante al ili la nomon "infano de fripono" aŭ "infano de murdisto".



Gajaj orfoj en la Infana Vilaĝo

Por helpi tiujn infanojn, Zhang Shuqin starigis infanan vilaĝon "Reveno".

En Ĉinio ĝenerale la departemento pri civilaj aferoj respondecas pri vivo de orfoj: Aranĝite de la departemento, la infanoj aŭ vivas ĉe parencoj kun subvencio, aŭ vivas en orfejo starigita de la ŝtato. Nun en Ĉinio orfejoj ne estas sufiĉaj, kaj malfacile por la parencoj garanti ke la de ili prizorgata infano ne foriros nek fariĝos vagabondo. Tiuokaze la ĉina registaro iniciatis praktiki diversajn rimedojn por pli bona vivo de la orfoj, ekz., popolaj organizoj aŭ individuoj starigis diversajn instituciojn, kia la infana vilaĝo de Zhang Shuqin.

Tiu infana vilaĝo, situanta en Dongzhou-vilaĝo, Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco, celas vivteni infanojn, kies gepatroj estas kondamnitaj al mallibereco. Guo Jianhua, estro de

Dongzhou-vilaĝo, donis al la infana vilaĝo monon kaj disponigis al ĝi 1 000 kvadratajn metrojn da tero por konstruado. Li mem laboras kiel ĝia estro. La Dongzhou-vilaĝanoj donis varman helpon al la infanoj: Ili aŭ helpis plibonigi la domojn, aŭ donacis monon por aĉeti meblojn, aŭ donis senpagan servon en har-tondado, edukado kaj kuracado. Emerita instruistino Wang Yanling respondecas pri senpaga edukado de la infanoj. En ĉiu semajnofino studentoj de la arta fakultato de la Shaanxi-a Normala Instituto venas de la provinca ĉefurbo por doni al la infanoj lecionojn de belarto, muziko kaj dancarto.

En la pasintaj 4 jaroj pli ol 30 infanoj estis vivtenataj en la infana vilaĝo, el kiuj la plej aĝa estas 14-jara kaj la plej juna — 4-jara. Zhang Shuqin kaj ŝiaj kolegoj trovis ilin en 16 urboj. La infana vi-

laĝo liveris al ili kvietan vivmedion. Puraj dormoĉambroj, legoĉambroj kaj amuzĉambroj, bonaj pedagogoj, kuiristoj kaj administrantoj... ĉio ĉi tio garantias, ke la infanoj vivas tiel bone kiel tiuj en normalaj familioj.

La vilaĝo atentigas edukadon pri memstareco de la infanoj, kiuj el-lernis mem zorgi pri lavado de vestoj kaj manĝiloj, pri ordigado de lito kaj purigado. Dank' al la 4-jara vivo en la vilaĝo la infanoj fariĝis prudentaj. Multe da ili korektis malbonajn kutimojn, kiaj interbatado kaj blasfemado. Ankaŭ progresis ilia lernado. Iom post iom ili ŝatis sian novan "familion", sur ilia vizaĝo ofte legiĝas rido, en la vilaĝo ofte aŭdiĝas la kanto:

*Ĉiu havas sian propran familion,
tamen kiu havas tiel grandan
kiel la mia?*

*Ĉiu havas siajn proprajn gepatrojn,
tamen kiu havas tiel multajn,
bonajn kiel la miaj?...*

La ŝanĝiĝo de la infanoj kortuŝis iliajn gepatrojn en malliberejo. Iu malliberulino diris: "Kiel patrino ne povanta plenumi patrinan devon, mi estas ŝulda al la infano. Pro tio mi eĉ intencis mortigi min mem. La infana vilaĝo vivtenas mian infanon, tio kuraĝigis min transformiĝi kaj penadi por pli frue rekuniĝi kun la infano."


Infano Cai Chengcheng donacis la dentobroson kaj mantukon, ricevitajn en la infana vilaĝo, al la patro enkarcerigita kaj diris al la lasta, ke li gajnis 100 poentojn en matematika ekzameno. La patro kortuŝite ploris kaj ripete esprimis: "Mi certe pentofaros."

Iu malliberulo skribis leteron al la infanoj: "Mi estas malliberulo kaj ankaŭ patro. Kompare kun vi, mia filo estas bonŝanca, ĉar lin prizorgas lia patrino. Nun mi donacas al vi 48 juanojn, kiujn mi ŝparis kaj intencis uzi kiel lernopagon por mia infano. Tamen por vi la mono estas pli bezonata. Per honesta laboro mi akiris ĝin..." ■

TEJO: 60 jaroj

Dum la 54-a Internacia Junulara Kongreso en Rijeka, Kroatio, TEJO festis sian 60-jariĝon. Tiuokaze la partoprenantoj dum la Solena Malfermo ĝuis bongustegan supertorton (1,8 x 2 m.) bele ornamitan, kun surskribo TEJO 60 jaroj kaj sesdek rozkoloraj kandletoj. La rezulto de altnivela laboro de la dolĉaĵistoj de la Studenta Domo de Rijeka kaptis grandan atenton de la ĉeestintaj amaskomunikiloj raportintaj pri la evento. Tre bona reklamo por Esperanto.

(Sanja Bokulic)



Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj (m)	kHz
11:00-11:30	Japanio, Koreio	41,84	7170
		31,46	9535
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25,86	11600
		25,34	11840
20:00-20:30	Eŭropo	40,51	7405
		30,11	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30,43	6860
		43,17	6950

BALETO EN SEMAJNOFINO

Vespere de ĉiu vendredo, kiam oni finas laboron en la semajno kaj pripensas, kiamaniere pasigi la semajnofinon, instruistino Zhu Shukai estas ja okupata de la baleta kurso.

S-ino Zhu havas pli-ol-40-jaran baletistinan vivon. Ŝi volas fari ankoraŭ ion utilan por la ĉina baleta afero, krom prezentado sur sceno. En 1986 ŝi kaj ŝiaj 5 kolegoj de la Centra Baleta Trupo provis okazigi baletan kurson por geknaboj.

“Karaj amiketoj, atente aŭskultu la muzikon! Ĉu venas printempo? Jen birdoj ĝoje kantas sur arboj, burĝonoj malrapide elvolviĝas. Pensu, kiaj estas la petaloj kaj kiamaniere la burĝonoj elvolviĝas. Geste faru tion per viaj manoj, ĉu bone?” Apenaŭ finiĝis la kurso de

la 3-a klaso, komenciĝis la elementa kurso. Jen iris la unua leciono.

La lernolibro uzata de s-ino Zhu estas “Kurso de la Brita Reĝa Ekzameno”. Ŝiaj kursanoj plejparte trapasis la ekzamenon okazigitan de la Brita Reĝa Kolegio kaj 97% de ili gajnis sufiĉe bonajn notojn.

Kun ekonomia disvolviĝo prosperiĝis en la pasintaj jaroj ankaŭ la ĉinaj kulturaj aferoj kaj oni inklinis ĝui precipe elegantajn muzikaĵojn kaj baleton. La principo de la baleta kurso gvidata de s-ino Zhu estas “laŭ volo oni partoprenu” kaj altiris al la kurso multe da homoj, kiuj antaŭe deziris lerni baleton, sed timis malfacilojn. S-ino Zhu kaj ŝiaj kolegoj nun gvidas 4 kursojn, inkl. tiun de plenkreskuloj. Ĉiu kurso konsistas el 20-30 lernantoj. Ŝia laboro estas multe helpata de ŝiaj familianoj. Ŝia filino iam eĉ ludas pianon en la kurso por akompani dancon.

KOLEKTANTO DE BIKIKLOJ

Wang Mingxi, 63-jara viro, havas 108 biciklojn, kiuj plejparte estas fabrikitaj en Japanio kaj Britio, kaj nur malmultaj el ili en Nederlando, Tajlando kaj Malajzio. Iuj el ili estas movataj per dentadoj, aliaj per rimeno kaj triaj per radĉeno. La bicikloj estas el plumba aloj, korodimuna ŝtalo k.a. Iuj havas kilometrokomputilon, rapidŝanĝilon, dekliv-indikilon k.a.

El la de Wang konservataj bicikloj estas biciklo produktita de Britio en 1920, el arĝentita korodimuna ŝtalo.

Estas tre malfacile por li trovi tenejon de bicikloj. Komence li tenis la biciklojn hejme kaj post nelonge lia domo ne povis enteni pliajn biciklojn. Li do devis lui subteran etaĝon de domo en la antaŭurbo.

Wang ŝatas bicikladi surstrate. Tiam multaj pasantoj turnas sian rigardon al li kaj lia neordinara biciklo.

Wang deziras interŝanĝi spertojn kaj biciklojn kun alilandaj kolektantoj. Li deziregas fondi muzeon de bicikloj en Ĉinio, kunlabore kun alilandaj kolektantoj.

DINOSAŬRAJ FOSILIOJ NOVE MALKOVRITAJ

Aŭguste de 1997 geologoj de Sichuan-provinco hazarde malkovris aron da dinosaŭraj fosilioj, kiam ili laboris en Gongxian-gubernio de la provinco. Post tio ili kun arkeologoj faris prifosadon en la loko kun 250 kvadrataj metroj kaj malkovris 6 kompletajn dinosaŭrajn



Dinosaŭraj fosilioj malkovritaj

La sonĝo de Tomka

fosiliojn, el kiuj 3 estas de saŭropiedaj kaj aliaj 3 — de bestopiedaj. Juĝate laŭ la dentoj, estas kaj karnomanĝaj kaj herbovoraj. El ili la plej granda longas 13 m kaj altas ĉ. 3 m. Tiuj dinosaŭroj kredeble vivis antaŭ 190 milionoj da jaroj.

Fakuloj konigis, ke la dinosaŭroj, kies fosilioj estis elterigitaj en Ĉinio antaŭe, plejparte vivis en la meza kaj malfrua periodoj de ĵuraso, sed estas tre malmultaj la fosilioj de dinosaŭroj de la frua ĵuraso. Tiuspecaj fosilioj elteriĝis nur en Hindio, Germanio, Aŭstralio, Zimbabvo k.a. Kaj plie, ili estas malgrandnombraj kaj malbone konservitaj. La fosilioj, elterigitaj en Gongxian-gubernio kaj apartenantaj al la frua ĵuraso, estas grandnombraj kaj bone konservitaj.

FORIGI MONTOJN EN LANZHOU

En la lastaj 3 jaroj oni pene laboris por forigi 3 montojn en la orienta parto de la urbo Lanzhou.

Lanzhou, kie vivas pli ol 3 milionoj da loĝantoj, situas en la nordokcidenta parto de Ĉinio. Ĝi estas longforma industria urbo. Ĉirkaŭite de montoj, la urbo estas senventa dum pli ol 300 tagoj jare, precipe en vintro, fumo leviĝas rekte supren el la kamentuboj kaj la arboj staras tute senmove. Tial, pri serioza polucio de la urbo oni diras: "En Lanzhou la suno estas sama kiel la luno, la serenaj tagoj ne diferencas de la malhelaj kaj la homaj naztruoj estas same nigraj kiel la kamentuboj."

Por batali kontraŭ la serioza polucio oni urĝe bezonas venton en Lanzhou. Tial aplikante diversajn metodojn por reguligi la medion, oni decidis forigi 3 montojn en la orienta parto de la urbo kun la celo enkonduki venton en la urbon, mildigi la atmosferan polucion kaj pliigi areon de la urbaj kvartaloj.

de LARISA KUZMENKO
(Ruslando)

NI havas hundidon. Lia nomo estas Tomka. Kiam Tomka dormas, li bojas dum sonĝo, jelpetas kaj iafoje eĉ per piedoj movetas, kvazaŭ li kurus ien.

Miaj infanoj demandis min:

— Kial Tomka bojas? Li ja dormas?!

— Li vidas sonĝojn, — respondis mi.

— Kiajn sonĝojn?

— Certe siajn proprajn hundajn sonĝojn pri ĉasado, pri bestoj kaj birdoj. Tiajn sonĝojn homo ne povas ekvidi.

— Interese! — ekkriis la infanoj.

Ili staris ĉirkaŭ la hundo kaj komencis rigardi, kiel Tomka dormas.

Tomka dormis, dormis kaj

subite ekjelpis per mallaŭta voĉo.

Mi demandis la infanojn:

— Ĉu vi komprenas, kion li sonĝas?

— Ni komprenas — diris la infanoj, — verŝajne li sonĝis leporeton aŭ birdeton.

Tomka dormis ankoraŭ iun tempon kaj ekmovetis per piedoj.

— Jen, vidu, — ekkriis la infanoj — Tomka ekkuris.

— Kiun li sekvas?

— Neniun. Li timas kapron kaj forkuras de ĝi, — ĝi ja kornobatas!

Subite Tomka ekmuĝegis, ekbojis.

— Vekiĝu, Tomka! Li ja formangos vin!

— Kiu? — demandis mi. — Kiu?

— Urso! Tomka volas lin bati. La urso estas ege turura. Tomka ne povas lin venki.

Finfine Tomka vekigis kaj mire rigardis al la infanoj. ■

Ĉina Esperantujo rete atingebla

Multaj ĉinaj E-organizoj nun havas retadresojn. Jen ni informas kelkajn el ili. Bonvolu kontakti ilin, se vi bezonas informojn kaj helpon, aŭ havas proponojn kaj konsilojn.

Ĉina Esperanto-Ligo: <cel@china-report.com>.

Redakcio de EPĈ: <epc@china-report.com>.

Ĉina Esperanto-Eldonejo: <cee@china-report.com>.

Libroservo de EPĈ: <libroservo@china-report.com>.

Ĉina Junulara E-Asocio: <cel@china-report.com>.

Tabloteniso en Ĉinio

de LI LIANG

DANK' al tabloteniso multaj alilandanoj ekkonis Ĉinion. Antaŭ 27 jaroj "Tablotenisa Diplomatio" proksimigis Ĉinion kaj Usonon kaj ŝanĝis la politikan strukturon de la mondo. Ĝis nun preskaŭ neniu sportbranĉo ĝuis tian honoron. Tial estas facile kompreneble, ke tabloteniso rapide progresas en Ĉinio.

"LANDA PILKLUDO"

En 1959 Rong Guotuan gajnis la unuan mondĉampionecon por Ĉinio en la Monda Tablotenisa Ĉampioneeca Konkurso. Tio sekvigis la sukcesojn de Ĉinio en la postaj tablotenisaj konkursoj. De la 25-a Monda Tablotenisa Ĉampioneeca Konkurso en 1959 ĝis la 44-a en 1997, ankaŭ en la Olimpiaj Ludoj kaj Mondpokalaj Tablotenisaj Konkursoj, la ĉina teamo gajnis 102.5 ĉampionecojn, inkl. tiun gajnitan en parludo kune kun alilanda sportisto. Pro la granda sukceso kaj multe da amantoj, tabloteniso fariĝis "landa pilkludo" de Ĉinio.

Granda nombro da ludantoj, elstaraj trejnistoj kaj tre fruktodona selekta sistemo estas garantio de multaj talentaj ludistoj por la ŝtata tablotenisa teamo. Estas eĉ tia diro, ke gajni tutlandan tablotenisan ĉampionecon estas multe pli malfacile ol la mondan.

Ne ekzistas ĉiamvenka ĝeneralo. Post 1988, kiam tabloteniso fariĝis konstanta konkurso-branĉo de la Olimpiaj Ludoj, multaj landoj donis grandan atenton al ta-



Cai Zhenhua (dekstre) en trajnado

bloteniso. En Eŭropo la ludistoj tre lertas en la kurba-linia atako, ili ankaŭ lernas la tradiciajn kaj avangardajn teknikojn de la ĉinaj ludistoj: rapida atako ĉe la tablo, brila ludo dum la unuaj tri atakoj, ekvilibro de atako kaj defendo, kaprica startbato... Ili havas komunan celon: venki la ĉinan teamon. Iuj ĉinaj veteranoj antaŭvidis la releviĝon de eŭropaj ludistoj kaj avertis: "Ili reatakos!" Kaj samtempe la trejna sistemo de la ĉina teamo sub la planizita ekonomio ne taŭgis por la nova situacio. Multaj talentaj ĉinaj tablotenisistoj aliĝis al alilandaj teamoj. Oni nomas ilin "armeo transmara". La ĉina teamo renkontis grandan malfacilon.

En la 41-a Monda Tablotenisa Ĉampioneeca Konkurso en 1991 la

vira teamo de Ĉinio ne enviciĝis inter la unuaj kvar fortaj teamoj. Tio estis neakceptebla por multaj ĉinoj.

JUNA ĈEFTREJNISTO

Ĝuste en 1991 Cai Zhenhua fariĝis ĉeftrejnistoj de la ĉina vira tablotenisa teamo. Kiel ludisto li havis laŭdindan sperton — li estis ĉefludisto, kiam la ĉina teamo gajnis ĉiujn ĉampionecojn en la 36-a Monda Tablotenisa Ĉampioneeca Konkurso. Poste li laboris kiel trejnisto en Italio. Informiĝinte pri la malvenko de la ĉina teamo, li forlasis la bone enspezigan okupon kaj revenis Ĉinion kun sia grava edzino. Tiam en Pekino li havis tre malgrandan loĝejon. Tamen li diris: "Mi estas ĉino. Mi devas fari ion

por mia patrolando.” Li devis ne nur montri sian kapablon, sed ankaŭ kun siaj junaj teamanoj pruvi al la samlandanoj, ke la ĉina teamo releviĝos.

En la komenco li ne instruis la teamanojn pri ludteknikoj, sed memorigis ilin pri devokonscio kaj amo al la patrolando.

Li ne celis momentan venkon. Por multjara venko necesas kreado kaj variado de ludteknikoj en longa tempo. Tion li konsciis. Li kuraĝigis ilin provi diversajn teknikojn: horizontale teni la batilon kaj ataki per kurba-linia kaj rapida atako, vertikale teni la batilon kaj uzi ankaŭ ĝian dorsan flankon, reataki dum defendo... Li scias, ke pli da teknikoj signifas pli da venkoj.

DEZIRATA RELEVĜO

Diligenta laboro alportas sukceson. Kiel ĉeftrejnistoj, Cai ankorau estas sangvina kiel junaj sportistoj. Sub lia gvido la junuloj rapide progresis. En 1991 la ĉina vira tea-

mo gvidata de li venkis la svedan. Tio redonis memfidon al la junaj ĉinaj ludistoj. Tamen li detenis sin de ĝojo.

Lia celo estis regajni Swaythling-pokalon — la plej altan honoron de la teama tablotenisa konkurso.

En 1995 okazis en Tianjin de Ĉinio la 43-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso. La ĉina vira teamo renkontis la svedan en la finalo. Tiun ŝancon Cai atendis 6 jarojn. En la 5 matĉoj la sveda teamo timis eble ne la ĉinajn spektantojn nek la diversajn ĉinajn teknikojn, sed la obstinecon de la ĉinaj ludistoj. Kiam la ĉina ludisto Wang Tao venkis en la lasta matĉo, li ĵetis la batilon supren kaj kuŝiĝis pro ĝojego sur la planko. Ankaŭ Cai ekscitiĝis kaj brakumis siajn teamanojn.

En la 44-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso en Manĉestro de Britio, ĉinoj gajnis ses el la sep oraj medaloj.

Antaŭ la Olimpiaj Ludoj en

Atlanto de Usono, suferanta de malsano Cai ne ripozis, sed aperis denove en la trejnejo. Tio vekis entuziasmon de la ludistoj. Kaj en la Olimpiaj Ludoj ili gajnis ĉiujn kvar ĉampionecojn.

LA ŜTONO DE SIZIFO

En Manĉestro, Waldner el Svedio gajnis la ĉampionecon en la vira solludo, tion ĉiam memoras Cai. En la lastaj gravaj internaciaj konkursoj Waldner, Vladimir Samsonov de Belorusio kaj Zoran Primorac de Kroatio gajnis preskaŭ ĉiujn ĉampionecojn de vira solludo. Venki ilin fariĝis nova celo de la ĉinaj junuloj. Cai tre ĝoje vidas, ke liaj teamanoj pene sin ekzercas kaj sukcesas en diversaj konkursoj. Por li la venonta celo iĝas pli kaj pli klara — venki en Beogrado, kie okazos la 45-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso.

Kaj pli fora estonteco? Verŝajne Cai ne havas finan celon, same kiel Sizifo, kiu eterne puŝas la ŝtonon.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Lernantoj, 7-8-jaraj, dez. kor. tm. Skribu al ilia instruistino Sandrine Menei CE 1/CE 2, ecole elementaire, 315, route des Serres, FR-06570 Saint-Paul de Vence, Francio.

* Juho Ilmari Vattulainen volas kor. tm. Adr.: 81160 Romppala, Rantakylantie 64, Finnlando.

* Rana Abedian, 28-j. studentino, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, precipe pri filmo, muziko, arto kaj literaturo. Adr.: P.O. Box 64815 - 439, Andimeshk, Iran.

* Yonier Cables Solis dez. kor. kun la intereso de kulturo, muziko, scienco, sporto kaj kutimoj de diversaj landoj. Adr.: Las Cruces de Purnio, Unidad #: 36-79 "La Cridla", Holguin 80100. Cuba.

* Kosa Peter serĉas gesamideanojn por skribi Esperantajn artikolojn por lia aperonta revuo duonjara kaj doni konsilojn pri Esperantaj ĉapelitaj literoj. Adr.: 4142 Sandominic, jud. Harghita, str. Solyom mr. 612, Rumanio.

KOREKTO

Anstataŭ *ekla* legu *eklabori en entreprena oficejo*. Post p. 12, lasta linio, novembro n-ro, 1998. Ni petas pardonon de s-ano Lluís Armadans i Marfa.

La Red.

Ĉin-medicina memkuraco

LA ĉina medicino enhavas abundon da efikaj medikamentaj kaj aliaj kurac-metodoj. La medikamentaj konsistas el popolaj receptoj kaj kuracaj manĝaĵoj, facile fareblaj. Aliaj kurac-metodoj konsistas el masaĝo, fomento k.a., sendoloraj kaj facile fareblaj. Se vi taŭge aplikas ilin, ili estas efikaj por kuraci gravajn malsanojn. De la januara numero sub tiu ĉi rubriko aperos artikoloj pri ĉin-medicinaj terapioj kontraŭ oftaj kaj malfacile kuraceblaj malsanoj. Tiuj kurac-metodoj estas facilaj, efikaj, malmulte pagigaj kaj tempoŝparaj. Kaj plie, ili povas esti farataj de la malsanuloj mem.

MEMKURACO DE GRIPO

Gripo estas inflamo en la supra spirkanalo kaŭzita de viruso aŭ bakterio. Ĝi atakas homojn en ĉiuj sezonoj, precipe en vintro kaj printempo. Laŭ la ĉin-medicina teorio estas du tipoj de gripoj, t.e. varmumo kaj malvarmumo.

Simptomoj: Tiuj de malvarmumo estas febro, neŝvitado, malŝato de malvarmo, doloro de la kapo kaj korpo, nazŝtopo kaj facila el-laso de muko. Tiuj de varmumo estas febro, malŝato de vento, kap-

doloro kaj sento de kapŝvelo, ŝvelo kaj doloro de la gorĝo, konstanta sento de soifado kaj facila ŝvitado.

I. Kuracado per popolaj receptoj

1. Preparu bovlon da varmaj vermiĉeloj kaj miksu ilin kun konvena kvanto da blanka pipro kaj ŝenopraza haketaĵo. Manĝu ilin kaj post tio tuj kuŝiĝu sub dikan litkovrilon. Vi resaniĝos post riĉa ŝvitado de malvarmumo.

2. Preparu 500 g. da rafano, 500 g. da sukerkano, 10 g. da lonicero, 5 g. da bambuaj folioj kaj konvenan kvanton da sukero. Tranĉu rafanon kaj sukerkanon en pecojn kaj metu ilin en fajencan poton. Enpotigu ankaŭ loniceron kaj bambuajn foliojn. Verŝu akvon en la poton. Kuiru ilin kune. Metu sukeron en la kuiritan trinkaĵon kaj trinku ĝin plurfoje ĉiutage. Tio estas efika por kuraci varmumon.

II. Kuracado per aliaj metodoj
Masaĝo:

1. Sidu aŭ kuŝu surventre kaj prem-knedu la akupunkturajn punktojn *fejŝu* per la du dikfingroj 1-3 minutojn, ŝmiru viajn manplatojn per iom da sezamoleo kaj per ili

frotu la spinon kaj talion de supre malsupren ĝis varmiĝo.

2. Prem-knedu la akupunkturajn punktojn *fengĉi* 1-3 minutojn.

3. Premu viajn ŝultrojn kaj brakojn per viaj mandorsoj 3-5 minutojn.

4. Frotu vian frunton kaj premu la akupunkturajn punktojn *jingŝjang* po 3-5 minutojn.

5. Prem-knedu la akupunkturajn punktojn *hegu* kaj *zusanli* po unu minuton.

Krom la supre menciitaj metodoj oni povas fari ankaŭ la jenon kiel aldonon:

Por kuraci malvarmumon

1. Kaptu kaj knedu muskolojn de la kvar membroj po 3-5 fojojn.


2. Per viaj du manoj forte kaptu la muskolojn ĉe la akupunktura punkto *ĝjanĝing* 5-10-foje.

Por kuraci varmumon

1. Prem-knedu la akupunkturajn punktojn *fengfu*, *tajjang* kaj *ĉjuĉi* po unu minuton.

2. Ŝmiru la dorson per alkoholaĵo kaj frotu ĝin 1-3 minutojn ĉe grava febro.

3. Kaptu la akupunkturajn punktojn *ĝjanĝing* kaj modere tiru ĝin supren. ■



Skulptaĵo el Shoushan-ŝtono



Shoushan-ŝtono produktiĝas en Fujian en sudorienta Ĉinio. Jam en antikveco ĉinoj komencis utiligi ĝin kaj poste aperis skulptaĵo el tia ŝtono, kiu okupas gravan lokon en la ŝtonaj skulptaĵoj en Ĉinio. La poŝtmarkoserio el kvin poŝtmarkoj kaj la miniatura filatelaĵo estis emisiitaj de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio en 1997.





Neĝo en antaŭurbo de Pekino

Foto de LIU CHUNGEN

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九九年第一期

(本刊代号：二—九—五) 国内统一刊号：CN11 1339 / G2